

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

En la numero:

PROGRAMO
POR TOTALA
MALARMADO

•

AL SCIENC-
TEKNIKA
PROGRESO

•

DU INTERESAJ
EKSPOZICIOJ

•

SUR E-POSTENO

•

INTERNACIA
LITERATURA
KONKURSO

•

ENKETO
DE „B.E.”

•

TRA LA
E-MONDO





PROGRAMO POR TOTALA MALARMADO

Kun grandega intereso, atento kaj vasta apogo en la tuta mondo oni akceptis la Deklaracion de Miĥail Gorbaĉov — Ĝenerala Sekretario de CK de KPSU¹. Ĝi estas gravega evento, ĉar ĝi prezentas inspirantan kaj mobilizantan strategian programon pri konkretaj, laŭetapaj paŝoj kun plej nobla celo — jam en nia jarcento efektiviĝu la revo de la homaro liberiĝi de la minaco de nuklea katastrofo. Tiu Deklaracio jam spertas favoran eĥon en la tutmonda politika vivo.

La Internacia Jaro de Paco, proklamita de la Unuiĝintaj Nacioj, havis esperigan starton per tia ampleksa historia alpaŝo flanke de Sovetunio kaj ĝia paca agado, prezentita kiel komplekso de pacamaj iniciatoj de la Ĝenerala Sekretario de CK de KPSU. La Deklaracio ankoraŭfoje pruvas la nedisigeblecon de la socialismo kaj la paco, la aktivecon kaj dinamikecon de la ekstera politiko de KPSU kaj de la sovetia ŝtato. Ili elmontras sian zorgemon pri la estonto de la planedo, pri la plej grava problemoj de la popoloj — vivi en mondo sen militoj, en mondo de interkompreniĝo kaj fruktodona kunlaborado.

Ce la sojlo de la novaj jarcento kaj jarmilo Sovetunio lanĉas gravan, klaran kaj allogan ideon: ke la homaro eniru la XXI jarcenton sen nukleaj kaj kemiaj armiloj: ke ĝi trovu la vojon al nova epoko de normalaj, konstruivaj rilatoj inter ĉiuj ŝtatoj en la kondiĉoj de paco sur la Tero kaj en la Kosmo, de sekureco kaj reciproka konfido.

Problemo de tre grava signifo estas la malbeligo de militarismigo de la Kosmo. La vojo al sukcesa malarmado sendube pasas tra paca Kosmo. Nur tiel oni povus atingi konkretajn rezultojn, veran prosperon en la tuta mondo.

Direktita al la homa racio, al la sento de la homaro pri memkonservo, la Apelo — la paca manifesto de Sovetunio, instigas al novaj penoj, al konkretaj agoj por sanigo de la politika klimato en la mondo.

Grava momento en la Deklaracio de Miĥail

Gorbaĉov estas la fakto, ke Sovetunio anoncas unuflankan plilongigon de la dekretita moratorio por ĉiuj eksperimentoj de nukleaj armiloj dum novaj tri monatoj. Tiel Sovetunio ankoraŭfoje montras rimarkindan ekzemplon pri respondeca rilato de unu nuklea ŝtato en nia nuklea jarcento al la plej gravaj kaj aktualaj problemoj de l'homaro. Ĝi montras modelon de saĝa kaj kuraga nova alpaŝo rilate la sekurecon de la monda civilizacio.

La konsekvenca pacama politiko de Sovetunio, la novaj ampleksaj kaj konstruivaj iniciatoj de la sovetia ŝtato, lanĉitaj fare de Miĥail Gorbaĉov, ĝuas la ardan apogon de ĉiuj, al kiuj estas karaj la problemoj de la paco kaj de la malarmado. Tiuj iniciatoj harmonias kun la konsekvenca agado de la socialismaj landoj por malarmado kaj monda sekureco, brile reflektita en la sofia deklaracio de la ŝtatoj-membroj de la Varsovia Kontrakto. Al similaj rezultoj estas direktitaj la konsekvenca konstruiva politiko de Popola Respubliko Bulgario, ĝia kontribuo al la bonnajbaraj-interrilatoj kaj kunlaborado sur la Balkanoj, por transformo de tiu regiono en zonon sen nukleaj kaj kemiaj armiloj.

La sovetaj proponoj estas standardo kaj inspiro por milionoj da homoj en la tuta mondo.

La bulgaraj esperantistoj varme salutas kaj plene apogas la plej novajn sovetajn proponojn, la Deklaracion de Miĥail Gorbaĉov kaj la Apelon de la Supera Soveto de USSR al la Kongreso de Usono. Ili konsideras tiujn dokumentojn plej ĝusta kaj rekta vojo por savo de la homaro el nuklea kaj kemia ekstermo, por prevento de militarismigo de la Kosmo, garantio por paco kaj sekureco en Eŭropo kaj en la mondo, por solvado de komplikaj konfliktoj.

La Apelo de Sovetunio devas ricevi seriozan konstruivan respondon de ĉiuj, al kiuj ĝi estas direktita. Ĝi instigas kaj inspiras al decidaj agoj. Surbaze de ĝia vasta platformo unuiĝos la fortoj de ĉiuj, kiuj sopiras pri mondo sen armiloj kaj militoj.

¹ KPSU — Komunista Partio de Sovet-Unio — Noto de Red.



La XIII kongreso de BKP kaj la scienc-teknika progreso

Inspirataj de la antaŭstaranta XIII kongreso de Bulgara Komunista Partio, senescepte ĉiuj laboruloj en nia lando antaŭ la difinita limtempo realigis siajn laborplanojn en la kadroj de la unueca plano por soci-ekonomia evoluo de nia respubliko 1986.

La kongreso antaŭenpuŝos nian evoluon al nova kulmino en ĉiuj sferoj de la vivo. Oni ofte komparas la unuajn paŝojn de nia socialisma lando kun la nuna stato. Antaŭ la Kvina kongreso de la Partio (1948) Georgi Dimitrov deklaris: „En du jardekoj nia popolo devas realigi tion, kion aliaj popoloj realigis dum jarcentoj“. Konsekvence efektivigante la direktivojn de la historia Kvina kongreso, precipe post la Aprila plenkunsido de BKP (1956), sub la saĝa gvidado de la Partio kaj de ĝia Politika Buroo ĉe-frunte kun la Ĝenerala Sekretario de CK de BKP kamarado Todor Jivkov, Bulgario senŝancele iras laŭ la vojo al matura socialismo. En daŭro de kvar jardekoj ĝi supreniris al la plej altaj pintoj de materialakaj spirita disfloro. Nun la lando eniras en la etapon de scienc-teknika revolucio, por sukcese realigi la grandajn problemojn de plua soci-ekonomia kaj kultura progreso. Tiu ĉi etapo postulas de ĉiu civitano ŝanĝi sian pensmanieron en revolucia senco.

Sur tiu vojo Bulgario ne estas sola, sed apogas sin sur la kolektivo de frataj socialismaj landoj en la kadroj de la Varsovia Kontrakto, kiu jam aprobis planojn por efektivigo de scienc-teknika progreso ĝis la fino de la dudeka jarcento.

Tiu ĉi scienc-teknika progreso havas nenion komunan kun la malhumanaj inventaĵoj de la nuntempaj militaristoj — specialistoj pri „stelaj militoj“, ĝi celas plibonigon de la vivkondiĉoj de la laboruloj.

La milvoĉaj radiostacioj de la imperiistoj hipokrite pledas por la homrajtoj de unuopuloj, sed restas tute indiferentaj por la vivrajtoj de la tuta homaro. La trobadoroj de la armilfabrikantoj ne vidas la senlaborulan armeon en sia lando, ne aŭdas la ploron de malsatantaj infanoj, ili vidas nur la rebrilon de la oro, la profitakciojn. En la landoj de reala socialismo, ankaŭ en nia lando, ne estas homoj sen laboro, sen loĝejo kaj sen pano. Ĉiu civitano rajtas senpagan kuracadon, feriojn en monto kaj ĉe maro. Jen la fonto de inspiro kaj dankemo al la politika avangardo, kiu gvidas nin al la pintoj de la scienc-teknika progreso.

La socialisma sociordo kapablas venki ĉiujn barojn, kiujn starigas antaŭ ĝi la kapricoj de la naturo. Estas ja fakto, ke dum 1984 kaj 1985 la senpluveco neniiĝis la duonon de la greno kaj aliajn agrarproduktojn. Niaj enviantoĵoj aŭguris fiaskon de niaj ekonomiaj planoj. Fiaskis la aŭguroj de la okcidentaj radiostacioj, ne ni. Nun ĉiu civitano en nia lando havas sian ĉiutagan panon, viandon, rizon, sukeron ktp. Tio ja evidentigas la avantaĝojn de la socialisma sociordo. Jen pro kio nia popolo plenforte apogas nian partion. Kaj ne nur pro tio. Ĝi batalas por konservo de la mondpaco, kiun la usonaj generaloj volas detrui per „limigita milito en Eŭropo“. Laŭ iniciato de kamarado Todor Jivkov ĝi laboras por ke la Balkanlandoj estu liberaj de nuklea kaj kemia mortigiloj. Ĉion ĉi aprobas niaj samlandanoj. Ili aprobas la movadon antaŭen al matura socialismo kaj ŝanĝas sian pensmanieron por esti indaj je tiu nova epoko. Ankaŭ ni, esperantistoj, ne postrestas, marŝas en takto kun la tuta popolo. Ju pli bonstata estos Bulgario, des pli da sukcesoj havos BEA.

Bulgario marŝas per grandaj paŝoj al la komunismo. Ĝian vojon lumigos la decidoj de la XIII kongreso de BKP.

ELOKVENTA KONFIRMO DE NIA STRATEGIO

GREGOIRE MAERTENS,
Prezidanto de UEA



Gustatempe por mondscale substreki la gravecon de la Centjara Jubileo de la Internacia Lingvo, Universala Esperanto-Asocio atingis novan grandan rekonon ĉe Unesko: la 23-a sesio de la Generala Konferenco de tiu monda organizaĵo akceptis komence de novembro 1985 en Sofio la Rezolucion 218 pri la tutmonda festado de la Centjara Jubileo de Esperanto. Tiu nova Rezolucio, pri kiu la membroj de UEA povis abunde legi en la decembra numero de la revuo Esperanto, ne nur rekonas la grandan progreson, kiun la Internacia Lingvo faris de post 1954 (jaro de la unua Unesko-rezolucio pri Esperanto), sed ĝi diras multe pli ol tion. Ĝi atentigas pri la granda potencialo de Esperanto por la edukado al internacia kompreniĝo kaj proksimiĝo de la homoj kaj popoloj, kaj ĝi per sia rekta invito al ŝtatoj-membroj kaj neregistaraj organizaĵoj kreas vastan politikan bazon por grandskalaj jubileaj aranĝoj tutmonde.

Mi tute aparte kontentas, ke la Rezolucio rekonas la progreson, kiun Esperanto faris rilate sian tutmondigon — „penetrante en la plimulton de la regionoj de la mondo kaj la plimulton de la homaj agadoj“ — ĉar ĝuste tio estis la ĉefaj priokupoj de UEA tra la pasinta jardeko. La sama strategio devas resti valida ne nur por UEA, sed por la tuta Esperanto-movado ankaŭ dum la venonta jardeko, ĉar la nova Rezolucio elokvente konfirmas la ĝustecon de la elektita vojo.

Kvankam UEA formale enkasigas la ĉefajn meritojn pro la nova rekono de Unesko, la tuta esperantistaro, ĉiuj landaj kaj fakaj or-

ganizaĵoj, kontribuis al tiu nova sukceso. La intimaj rilatoj, kiujn UEA jam de multaj jaroj flegas kun Unesko kaj ĝiaj ĉefaj funkciuloj, la engaĝiĝo de nia Asocio en la laboroj de Unesko — ĉio tio restus nur io pli ol formalaĵo, se similajn rilatojn je la landa nivelo ne flegus niaj asocioj en Belgio, Bulgario, Ĉinio, Japanio, Jugoslavio, Pollando ktp. La jugoslava delegacio en la Generala Konferenco ne estus proponinta la Rezolucion sen la granda laboro, kiun la esperantistaro de tiu lando faras por disvastigi la Internacian Lingvon. Ankaŭ la ĉina delegacio ne estus subteninta la rezoluciproponon sen la agado de Ĉina Esperanto-Ligo.

Se la Rezolucio estas nia komuna atingo, ĝi nun des pli fariĝas nia komuna tasko, ĉar ĝi fine havos nur tiom da graveco, kiom ni sukcesos doni al ĝi. Tiu dokumento estas nur la konvena ponto por aliri la registarajn kaj internaciajn organizaĵojn, partoprenigi ilin en la Jubileo kaj tiel atingi novajn, pli praktikajn, pli realajn sukcesojn kaj rekonon al la Internacia Lingvo.

Ni ĉiuj certe konscias, ke nia tuta antaŭjubilea agado ne celas la Jubileon mem, sed la sorton de la Internacia Lingvo post la Centjara Jubileo. Al tia pensado aliĝas ankaŭ la Rezolucio mem, ĉar ĝi invitas la ŝtatojn-membrojn „instigi al la enkonduko de studprogramo pri la lingvo-problemo kaj pri Esperanto en siaj lernejoj kaj siaj institucioj de supera edukado“. La tuta Esperanto-komunumo devas kompreni, ke Unesko direktas tiun inviton ankaŭ al ĝi.

Komence de la nova jaro 1986 ni do staras antaŭ novaj taskoj kaj ne malpli da laboro ol ni havis tra la tuta centjara historio de Esperanto. La Jubileo estas proksima, sed la venko de la Internacia Lingvo ankoraŭ restas en fora estonteco. Feliĉe, tiu estonteco fariĝas ĉiam pli proksima, kion bele emfazas ankaŭ la nova Rezolucio.

Ni laboru kaj esperu! Zamenhof mem signis al ni la vojon en sia samnoma poemo: L'espero, l'obstino kaj la pacienco —/jen estas la signoj, per kies potenco /ni paŝo post paŝo, post longa laboro/, atingos la celon en gloro.

Nia komuna laboro en 1986 karakteriziĝu per tiuj zamenhofaj obstino kaj pacienco, per organiziteco kaj kontinueco, kaj ĝi certe proksimigos nin al nia komuna celo!

IMPETA VIRINA AGADO

Granda estas la merito de la bulgaraj esperantistinoj por evoluo de la E-movado en nia lando kaj eksterlande, granda estas la rekono pri ilia multfaceta kontribuo al konstruado de la nova vivo en Bulgario.

Dum sia jara konferenco en Sofio, junio 1985, niaj virino-esperantistinoj raportis pri konsiderindaj sukcesoj. Eĉ la ĉeestanta vicprezidanto de BEA, k-do Petăr Todorov, diris: „La agado de la Virina Komisiono ĉe BEA estas riĉa je iniciatoj. Ni povas nur fieri pri tiu agado, kiu distingiĝas de la agado de la aliaj virinoj kaj havas gvidan rolon ankaŭ internaciskale — per la agado de la Komisiono pri Virina Agado (KVA) ĉe UEA.

En iuj distriktoj la esperantistinoj kontaktis kun la lokaj estraroj de la amasaj organizaĵoj — la sekcioj de la Komitato de Movado de Bulgaraj Virinoj, de Patrolanda Fronto k. a. Kune kun tiuj organizaĵoj kaj dank al ilia helpo la esperantistinoj ofte organizas komunajn iniciatojn, celebroy, ekskursojn, renkontigojn k. a., kiel ekzemple en Jambol, Sumen, Burgas, Sofio kaj aliloke. Multaj el niaj aktivulinaj laboras fervore kiel estraraninoj kaj dediĉas sian liberan tempon por popularigo kaj disvastigo de Esperanto, aliaj gvidas E-kursojn, estis rektoro de la Someraj E-kursoj de IEK en Pisaniĉa — merita rekono de ŝia fidela laboro por Esperanto; Elena Stojkova el Burgas, Penka Papazova el Jambol, Veska Dragostinova el Sumen, Maria Pejnova el V. Târnovo kaj multaj aliaj ofte kunlaboras kun la amasaj organizaĵoj favore al la Inter-

nacia Lingvo. Stefka Toteva el Gabrovo estas unu el iniciatintoj de nova sperto en la Panuzino, ŝi interrilatas kun la uzinaj aŭtoritatuloj, kiuj helpas la E-agadon en la uzino. Esperantistinoj el Blagoevgrad-distrikto esploras la vivon de la partizano Nikola Parapunov, lerninta Esperanton en la malliberejo de Sliven. Stefka Ĉenkova esploras la vivon de la esperantisto-komunisto Trifon Hristovski. Vasja Cvetkova, sekretario de MEM, prelegis pri Japanio en pluraj E-societoj en la lando. Ĉi-jare ŝi estos lektoro en ISEU en V. Târnovo. Sub la „Apelo de Hiroŝima kaj Nagasaki por totala malpermeso kaj elimino de nukleaj armiloj“ centojn da subskriboj por paco kolektis Sonja Tiĥova kaj Stefka Toteva el Gabrovo, Maria Pejnova el V. Târnovo, d-rino Cveta Stamenova, Vasja Cvetkova kaj Veneta Baleva el Sofio. Belka Beleva, Angelina Sotirova, Maria Angelova el Sofio partoprenis plurajn artajn programojn, festivalojn kaj konkursojn kiel artistinoj kaj kiel kompetentaj ĵurianoj.

Multaj el la bulgaraj esperantistinoj verkas materialojn por nia asocia organo „Bulgara Esperantisto“ kaj aliaj E-revuo, iuj — eĉ rakontojn kaj versaĵojn, kiel ekz. Penka Papazova el Jambol, Ljuba Bojaĝieva, Nevena Nedelĉeva, Neli Abaĝieva, Penka Batoeva, Maria P. Angelova el Sofio, Stamenka Dimitrova el Botevgrad k. a.

Meritoplana kaj riĉenhava estas la agado de niaj aktivulinaj sur la internacia E-kampo. Brila ekzemplo pri ilia inda laboro estas ilia partopreno en la 70-a UK en Augsburgio pasintjare. Belka Beleva estis prelegantino en la kunveno de KVA ĉe UEA pri temo „Parolmaniero ĉe E-societo“, bonege kaj entuziasme akceptita de la ĉeestintaj

virinoj. Parolis ankaŭ la aktivulino Lilia Koleva, kiu multfoje gajnis la unuajn premiojn en internaciaj konkursoj. Du niaj esperantistinoj estis elektitaj sur respondecajn postenojn: Vasja Cvetkova fariĝis sekretario de MEM, bona rekono de ŝia multjara MEM-agado, kaj la juna Veneta Baleva fariĝis sekretario de ILEF. Belka Beleva aktorinaj mastre en la kongresaj spektakloj „Tri viroj en la neĝo“ kaj „La Aŭsburga kretocirko“, samkiel ŝiaj novaj E-koleginoj-aktorinoj. Maria Angelova, Jana Cikalova, Galja Kostova ĝuigis la ĉeestantan publikon per sia bela kantado. Angelina Sotirova, Jana Cikalova, Galja Kostova kaj Vasja Cvetkova partoprenis la kunvenon dediĉitan al la „Tago de Paco“ kaj la Publikan Kunvenon de MEM. Fine mi menciui la partoprenon de Fani Miĥajlova kiel E-lektoro en Svedio kaj de d-rino Stamenova kiel preleganto en la medicinista renkontigo en Schwerin, GDR.

Estas starigitaj konstantaj kontaktoj de la Virina Komisiono ĉe BEA kun KVA ĉe UEA, kio multe helpas per la komuna laboro kaj celoj. Pasintjare, lige kun la Jardeko de la Virino, proklamita de UN (1975—1985), en Nairobi (Kenio) okazis konferenco kaj forumo, kiujn partoprenis s-ino Anita Lindblom, estraranino de KVA. Por unua fojo UEA estis reprezentita oficiale en tia granda internacia manifestigo.

Ankaŭ ĉi-jare la bulgaraj esperantistinoj inde kaj responde plenumos siajn taskojn. Honore al la XIII Kongreso de BKP ili plu laboros por la nobla ideo de Esperanto. Lige kun la „Internacia Jaro de Paco“, proklamita de UN, ili konferencos maje en Burgas partoprenos plurajn paciniciatojn. Ili konstante pliperfortigos sian lingvokanon, laboros diverskampe honore al la 100-jara jubileo de Esperanto kaj por plenumi la decidojn de la 41-a Kongreso de BEA.

V. ANTONOVA

Ekspozicio de originalaj kreantoj

81 pentraĵoj faritaj per oleaj farboj kaj 88 skulptaĵoj el bronzo kaj gipso. Tio estas, koncize dirite, per la lingvo de ciferoj, la komuna ekspozicio de la pentristino-esperantistino Maja Gorova kaj de ŝia edzo — la skulptisto Bogomil Jivkov, organizita (fine de decembro 1985) en la Ĉefurba Belarta Galerio sur strato „Ŝipka“ 6. Kvankam relative junaj (la pentristino finis fakon „Murpentrado“ de Bulgara Belarta Akademio en 1972, kaj la skulptisto diplomigis unu jaron pli frue), ambaŭ kreantoj estas jam konataj ne nur al nia publiko, sed ankaŭ eksterlande. Iliaj pentraĵoj kaj skulptaĵoj trovigas en multaj galerioj en Bulgario kaj alilande.

Por ĝui la arton de Maja Gorova kaj Bogomil Jivkov, la 13-an de januaro j. k. multaj esperantistoj el Sofio vizitis la ekspozicion. Ili havis la eblecon ne nur konatiĝi kun iliaj verkoj, sed ankaŭ renkontiĝi kaj interparoli kun Maja Gorova. Laŭ ilia peto ŝi rakontis pri sia kaj pri tiu de ŝia edzo krelaboro.

La sincera kaj agrabla interparolo finiĝis en Esperanto — la lingvo, kiun Maja Gorova lernis kaj ekamis dank' al ŝia patro — la veterano-esperantisto Ĥristo Gorov, prezidanto de Bulgara Esperantista Asocio.

Ĉi-apude ni publikigas recenzon pri la ekspozicio.



„Avinjo Marta“ — olea pentraĵo de Maja Gorova

„Kiam la koloroj estas plej intensaj, tiam la formo ricevas sian plej plenan, plej veran forton!“ — ŝatis diri Paul Cézanne. La toloj de Maja Gorova, kiujn ni havis la plezuron ĝui antaŭ nelonge, estas la pruvo, ke ŝi scipovas profiti la tutan emocian ŝargon de la koloroj kaj samtempe obeigi ilin — fari tiel, ke ili plenumu plej fidele sian parton en la kompleta harmonia konsonanco, kia estas ĉiu ŝia pentraĵo. Mi devas rekonii, ke nun, starante antaŭ ŝiaj verkoj, mi tute ne povas diri, kiu el ili estas plej bona, plej atentokapta. Mi ne povas kompari, des pli malmulte — kontraŭstarigi. Restas nur unu — la sola eliro: ke mi parolu pri la tutaĵo. Nature, ĝis la grado, ĝis kiu mi sukcesis enpenetri la spiriton de ŝia komplika arto. Ĉar la pentristino kreas la iluzion, ke ŝi pentras plej detale kaj fidele, fotografe ordinajn, konatajn aĵojn: malnovaj domoj, objektoj, maraj pejzaĝoj, domfenestroj en Sozopol, urba pejzaĝo en Vilno, homoj. Ĉion ĉi ni vidis iam, ie. Kaj vidinte — indiferece preterpasis. Sed fakte Maja Gorova celas pruvi al ni, ke ni ne rajtis aĝi tiel, ke ni devis, simile al ŝi, serĉi la kaŝitan sencon en ĉio, kio nin ĉirkaŭas kaj kion ni nomas ekzistado. Ŝi ekkondukas nin trans la videblaj bildoj, prezentitaj sur la tolo, al la profundaĵo de ŝia propra mondo. Ŝi montras al ni la nekonatajn flankojn de konataj objektoj, ĉar ŝi donis al ili novan sencon, reflektante ilin tra la prismo de ŝia filozofia vidmaniero! „Vita brevis!“ — „La vivo estas mallonga“ — jen la dua parto de latina sentenco. Per ŝia bildo, havanta kiel moton la supre cititan sentencon, ŝi eldiris ankaŭ ĝian unuan parton. La arto estas longedaŭra („Ars longa“) kaj estas necese, ke oni plene dediĉu sin al ĝi — tiel, kiel faris la pentristino. Tial ŝia modelo estas ne simple maljunulo, sed belarta esprimo de la ideo pri mallongedaŭro de la vivo, pri tio, ke la sola senco de la vivo estas krei por la homoj. Tiel faris ankaŭ ŝia patro — sur la bildo, kiun la pentristino dediĉis al li, oni vidas la animriĉecon de tiu ĉi homo. Ne gravas, ke li mem ne estas prezentita sur la tolo — lia ĉeesto tamen estas sentebla — la pentristino igis la libron de li skribitajn kaj la objektojn, kiujn li uzis — paroli pri li.

En la bildoj de Maja Gorova la objektoj plenumas ekskluzive gravan rolon. Por ŝi ili estas ne nur fragmentoj de la vivo, ili estas la vivo mem. La malplena cigaredskatolo, la ĉifita revuo — ĉio, kion ni uzis kaj poste forĵetis — same estas la vivo. Kun multe da ironio kaj doloro la pentristino kreis la bildon kun moto „Civilizacio“. Kun ironio kaj doloro estas kreita ankaŭ la bildo „Idoloj“, por igi nin pli poste denove vidi, per la spiritaĵoj okuloj, kiujn ŝi donacis al ni, la eternan saĝon de la mondo.

El teoria vidpunkto la pentroarta maniero de Maja Gorova verŝajne povus esti klasita al la belarta fluo — „nova objektismo“. Pareneco en la formo, eble, sed ĝi aperas sur la unua plano. En la konscio de la spektanto restas tiuj profundaĵoj de la penso, kiujn ŝi malkovris antaŭ li per ŝia saturita de poezio kaj tre humana arto.

El la praktiko oni scias, ke la verkoj de la skulptarto plej bone „kunvivadas“ kun grafikaĵoj aŭ skizoj. Estas sciate same, ke skulptistoj neniam volonte konsentas, ke iliaj verkoj estu ekspoziciataj en unu halo kun verkoj de la pentroarto. Sed mi tuj devas substreki, ke Bogomil Jivkov entreprenis tiun „riskoplanan“ paŝon — ne esti rimarkita, ne nur ĉar li estas edzo de Maja Gorova. Li, evidente, estas certa, ke liaj verkoj povas elteni en „duelo“ eĉ kun plej forta konkuro. Per la ekspoziciitaj verkoj li efektive pravas,



„Viro kun hundo“ — skulptaĵo de Bogomil Jivkov

ke li ne eraris. Sed fakte, entute ne temas pri duelo, nek pri konkurado. Simple la verkoj de la du aŭtoroj bonege harmonias!

Tiun spiritan parentecon inter ambaŭ kreantoj oni povas plej bone senti kaj vidi en la komplika komponaĵo, ampleksanta la tolon de Maja Gorova „Angulo en la domo de mia avino“ kaj la murskulptaĵon „Rememoro el mia infanaĝo“ de Bogomil Jivkov.

Parolante pri la malfacilaĵoj, kiujn devis venki Bogomil Jivkov, mi prenis en konsidero ankoraŭ unu: la ĝenerala belarta nivelo de nia skulptarto estas tiel alta, ke estas tre malfacile por juna kreanto okupi lokon en ties fruntvicoj. Bogomil Jivkov, ne ŝirante la loĝojn kun la ĝenerala spirito kaj direktoj de evoluo de nia nuntempa plastiko, sukcesas dividi proprajn pensojn pri tuthomaraj problemoj. Liaj verkoj parolas pri „Fremdiĝo“, pri „Proksimeco“ kaj pri la tiel ofta „Rompo“ de la interrilatoj. Li havas sian propran vidpunkton ankaŭ pri ĉio okazanta en nia plena de malkonsekvencoj „Dudeka jarcento“, havas sian „Pozicion“ ĉie.

Konklude mi volus diri, ke tiu bonega ekspozicio estis vera festo por la ŝatantoj de pentroarto kaj skulptarto en Sofio, kaj substreki unu plian kvaliton de la arto de ambaŭ artistoj. Ili bonege konas „L'art d'attendre“ — kiel diras la francoj, t. e. la arton atendi, la arton ne ĉion diri. Arto, kiu igas la spektanton pensi, ĉar li mem devas komentarii la verkon, estiĝi, tiel dire, kunaŭtoro. „Tago unua“ — moto de unu el la bildoj de Maja Gorova. Kalendarfolio. Dato — 20-a de julio, sepa horo. Verŝajne temas pri naskiĝtago — eble de la pentristino, eble de ŝia edzo, eble — la komenco de ilia amo. Kaj povas esti ankaŭ naskiĝtago de la granda arto, kiun ili ambaŭ, man-en-mane, kreas. . .

Antonij DJAKOV

„Hungara Vivo“ —

25-jara

„Hungara Vivo“ fariĝis 25-jara. Ĝia unua numero aperis en 1961 kaj ĝia starto estis festo ne nur por la hungaraj esperantistoj, sed ankaŭ por la tutmonda esperantistaro. La neforgesebla „Literatura Mondo“ jam delonge subiris kaj ne estis simptomoj por ĝia baldaŭa renaskiĝo. En „Hungara Vivo“ oni vidas indan posteulon de la impona literatura revuo. Ja en Hungario ankoraŭ vivis kaj aktivis Kalocsay, Baghy, Szathmári.

Unua redaktoro de la revuo fariĝis Ludoviko Kőkény, nelacigebla Esperanto-jurnalisto, aŭtoro, redaktoro de „Enciklopedio de Esperanto“. Per la enkondukaj vortoj en la unua numero, Julio Baghy trafte esprimas la celojn de la ĵus naskita revuo. „Per ĝi ni celas konatigi nian landon kaj popolon, kies historia rolo en la kultura evoluo de Mezeŭropo havis ne neglektindan signifon“. Baghy emfazas, ke „Hungara Vivo“ estos ne nur landa propaganda revuo en Esperanto, sed ĝi havos internacian karakteron. Ĝi semos kaj rikoltos: „Fidon, Amikecon, Pacon“. Nun ni konstatas kiel klarvida estis la fama Esperanto-verkisto ankoraŭ en la aŭroro de „Hungara Vivo“.

Jam la unua numero ravas nin per sia alloga kaj riĉa enhavo: interesaj artikoloj pri Hungarlando, poemoj de Petöfi en traduko de Kalocsay, „Torĉo“ — originala poemo de Tárkony. . . Cefkunlaborantoj de la revuo estas J. Baghy, K. Kalocsay kaj L. Tárkony. Mi povas imagi la emociojn, per kiuj la legantoj trafolumis tiun ĉi unuan belaspektan kaj ampleksan numeron. En la sekvaj numeroj aperadis artikoloj, poemoj, noveloj de Kőkény, Balkany, Szathmári, Emba.

Post ok jaroj, en 1968, redaktoro de la revuo fariĝis Mihály Gergely, konata hungara verkisto kaj esperantisto. La enhavo de „Hungara Vivo“ plivastiĝis, sur ĝiaj paĝoj aperis novaj aŭtoroj. Iliaj kontribuajoj montras, ke en Hungario kreskas tradukistoj kaj verkistoj indaj daŭrigi la noblan agadon de la Esperanto-klasikuloj. Krom tio la revuo pli larĝe malfermas siajn paĝojn por la Esperanto-kulturo kaj literaturo. Aperas apartaj numeroj dediĉitaj al originala Esperanto-prozo, poezio, dramo, numeroj pri K. Kalocsay, S. Szathmári, pri „Literatura Mondo“. Aperas bazaj artikoloj pri Esperanto-literaturo, verkitaĵ de W. Auld, M. Boulton, K. Kalocsay. Abundas originalaj poemoj, noveloj de la plej elstaraj nuntempaj Esperanto-aŭtoroj.

En 1977 Mihály Gergely pensiĝis kaj la redaktadon de la revuo transprenis Vilmos Benczik. Sur la paĝoj de la revuo komencis aperi interesaj konstantaj rubrikoj, kompetentaj recenzoj, originalaj Esperanto-poeemoj kaj noveloj, facilaj legaĵoj por la novaj esperantistoj.

Okaze de la 25-jara jubileo la Ĝenerala Sekretario de la Centra Komitato de Hungara Socialisma Laborista Partio János Kádár sendis salutleteron al la redakcio de „Hungara Vivo“, en kiu li emfazas:

„La gazeto per sia kvaronjarcenta agado atingis prestiĝan lokon inter la esperantlingvaj eldonaĵoj de la mondo, kaj akiris multajn amikojn por la hungara popolo kaj ĝia kulturo.“

La bulgaraj Esperanto-legantoj kaj la redakcio de „Bulgara Esperantisto“ tutkore salutas la redakciaĵojn de „Hungara Vivo“ kaj deziras al ili novajn sukcesojn en ilia nobla agado.

Georgi MIĤALKOV

„Hungara Vivo“. Jarabono — 8,22 levoĵ. Abonebla pere de la Entrepreno por Disvastigo de Periodaĵoj (REP).



SUR ESPERANTO- POSTENO

Hristo Kanev naskiĝis en 1915 en vilaĝo Lovec, distrikto de Stara Zagora. En la periodo 1929—1932 li lernas en la gimnazio de Stara Zagora. Jam en 1929 li aktive partoprenas la laboron de la marksismaj-leninismaj grupoj. En tiu periodo la junulo komencas lerni ankaŭ Esperanton en kurso, organizita de la Laborista E-Asocio (LEA), fariĝas membro de la Laborista Junulara Unuiĝo (RMS). Pro sia revolucia agado Hristo Kanev estas por ĉiam eksigita el la gimnazio, arestita dum surstrata manifestacio kaj kruele torturita en la polico.

La laborvivo de la juna komunisto komenciĝas en la gepatra mastrumo en la vilaĝo. Post unu jaro li estiĝas oficisto en la loka kooperativo. Kaj ĉiam en tiu periodo li okupiĝas pri aktiva revolucia agado — partoprenas en partiaj, komsomolaj kaj esperantistaj distriktoj kaj regionaj konferencoj. Tiutempe Hristo Kanev estas sekretario de la Distrikta Komitato de Komsomolo en vilaĝo Kalojanovec kaj membro de la Distrikta Komitato de la Bulgara Komunista Partio. Tiutempe li realigas organizajn kontaktojn inter DK de BKP en Stara Zagora kaj la sofiaj partiaj organoj, helpas malsanajn revoluciulojn, transportas nelegalan literaturon, instrukciojn kaj materialojn, donitajn al li de CK de BKP.

Samtempe Hristo Kanev gvidas kurson de Esperanto kaj organizas societon de LEA.

Pro sia progresema politika agado li estas ĵetita en malliberejon, kondamnita al trijara malliberigo.

En 1938 Kanev estas laborsoldato. Ankaŭ en la kazerno li organizas aktivan revolucion agadon.

Dum la periodo de la Dua Mondmilito li denove kaj senĉese laboras por plenumo de la partiaj taskoj — kolektado kaj interŝanĝo de armiloj, sukcesaj elpaŝoj konekse kun la Sobolev-akcio en 1940 ktp. Kelkfoje arestita en 1941, Hristo Kanev estas loĝigita fare de la polico en la regiono de urbo Harmanli. Post tio li revenas en sian naskiĝvilaĝon, sed baldaŭ forveturas al la Egea Maro. Du jarojn li restas tie, helpante partizanojn kaj iliajn familiojn. En aŭgusto — decembro 1943 Kanev estas ĵetita en la koncentrejon Demir Hisar kaj de majo 1944 — en la koncentrejon apud Stara Zagora. Tie, la 8-an de septembro, li renkontis la liberigon.

Hristo Kanev aktive partoprenis en la establo de la popola regpotenco en Stara Zagora je la 9-a de septembro 1944.

Komenciĝas nova vivo en nia patrolando, ankaŭ por kamarado Kanev. Kiel oficisto en la organoj de Ministerio de Internaj Aferoj en Stara Zagora kaj en Sofio, li laboras por stabiligo de la popola regpotenco. Li dediĉas sian tutan energion kaj sperton al la socialisma konstruado. Samtempe studas foreste kaj sukcesas fini gimnazion, poste la fakon „Juro“ ĉe la Sofia Universitato. Sekvis laboro en la redakcio de ĵurnaloj „Zemedeľsko Zname“ kaj „Naroden Sport“, poste en la eldonejo de Bulgara Akademio de Sciencoj, kie li emeritiĝis kiel ĉefredaktoro.

Dum sia tuta vivo Hristo Kanev estas fide-la, sindona kaj tre laborema esperantisto. Dum la periodo de faŝismo kaj kapitalismo li korespondadis kun esperantistoj el Sovetunio, Germanio, Ĉinio, Francio, Alĝerio k. a.

Multon el sia enhavoriĉa korespondado li publikigis tiutempe en la klasbatalaj periodaĵoj de LEA, unualoke en la ĵurnalo „Mejdnaroden Rabselkor“. Li gvidis E-kursojn, ĉiam helpis morale kaj materiale la E-movadon. Dum pluraj jaroj li estis prezidanto de la Centra Kontrolo Komisiono de BEA kaj prezidanto de la Urba Estraro de BEA.

Okaze de la 70-jariĝo de Hristo Kanev, per dekreto de la Stata Soveto de PR Bulgario li estis distingita per la ordeno „Popola Respubliko Bulgario“ — dua grado, por aktiva partopreno en la batalo kontraŭ faŝismo kaj kapitalismo kaj en la socialisma konstruado de nia patrolando.

Gratulojn, kara kamarado Kanev, kaj bondezirojn pri sano kaj persona feliĉo.

Petrana MILANOVA

LA APRILOV-GIMNAZIO — VERDA TORĈO

En la komenco de la jarcento la internacia lingvo Esperanto komencas disvastiĝi en Gabrovo, tiutempe jam konata kiel kultura kaj industria centro. La Aprilov-gimnazio ĉiam estis lulilo de progresemaj kaj patriotaj ideoj kaj agoj. En numero 2 de gazeto „Semo“ de monato februaro 1911 estas informo, ke „Esperanto disvastiĝas precipe inter junuloj — lernantoj en la gimnazio.“ En la sekvantaj numeroj estas informoj pri sukcesoj de la esperantistoj.

Post la militoj, en 1919 la urba esperantista societo „Verda Torĉo“ restarigas sian agadon kaj ĝia unua tasko estas malfermi kursojn por lernantoj kaj civitanoj. La 7-an de septembro 1921 la prezidanto de Bulgara Esperantista Asocio Georgi Aktarĝiev parolis antaŭ lernantoj kaj lernantinoj en la knaba kaj knabina gimnazioj, liaj paroladoj estis amase vizititaj. En tiu lernojaro (1921) la du gimnazioj unuiĝas kaj la lecionoj okazas en la knaba Aprilov-gimnazio. Esperanto estas enkondukita kiel fakultativa lernobjekto. En 1923 kelkajn monatojn lektoro estis Vasil Tabakov, sed en la fino de tiu jaro la fakultativa instruado estas forigita kaj la grupo fermata.

Sed la esperantista societo, dank' al la aktiva helpo de la lektoro en la Teknika Lernejo Koljo Benev sukcesas restarigi la kurson la 29-an de februaro 1924 kun 40 gekursanoj, kiuj plimultiĝas ĝis 50. En la komenco de monato aprilo estas fondita la lernejana esperantista societo „Estonteco“, kiu komencas aktive labori.

Pri la aktiva esperanta agado de societo „Estonteco“ informas revuo „Esperantista junularo“ en 1927. En la komenco de la 30-aj jaroj la agado de la lernejana esperantista societo ĉesas. Sed dum la lernojaro 1934/35 la elstara esperantisto Radoslav Triĉkov malfermas kurson por lernantoj en la gimnazio, infanan kaj civitanan kursojn. La kurso en la gimnazio funkcias perfekte, tamen dum monato marto 1935 Triĉkov kiel komunisto estas forpelita el Gabrovo kaj la kurso ĉesigas la laboron.

En 1940 la lektoro Petăr Kamburov, per la helpo de Boris Birov, malfermas tri kursojn de Esperanto — por lernantoj en la Aprilov-gimnazio, en la Teknika Lernejo kaj por laboristoj kaj civitanoj. Helpanto de Kamburov estas Neno Janev — lernanto en la gimnazio. Respondeculo de la kurso en la Teknika Lernejo estas Dimo Martinov el vilaĝo Krân, kiu antaŭ kelkaj jaroj fondis Esperanto-muzeon en sia naskiĝvilaĝo.

Post la ferioj en januaro 1945 laŭ deziro de la lernantoj en la Aprilov-gimnazio, la prezidanto de esperantista societo „Verda Torĉo“ Neno Janev malfermas kurson kun lektoro Bojana Prodanova. De tiam ĝis la fino de 1966 ĉiujare funkciis kursoj de Esperanto.

La instruistino en la Aprilov-gimnazio Rumjana Janeva ekde 1983 instruas fakultative Esperanton en du klasoj — por komencantoj kaj por progresintoj (dua grado). Kun grupo da lernantinoj ŝi preparis belantan programon kaj la pasintan jaron (1985) en la junulara festivalo de esperanta parolo en Haskovo la grupo gajnis unuan lokon.

Nun la gelnantoj-esperantistoj, sekvante la riĉajn tradiciojn hereditajn el la pasinteco, havas bonajn kondiĉojn por labori kaj disvolvi siajn talentojn per Esperanto.

Bojana PRODANOVA

LI ESTIS ĈIAM SINDONA

La 10-an de septembro pasintjare forpasis Atanas Ŝopov, elstara esperantisto-veterano el urbo Plovdiv.

Li naskiĝis la 3-an de januaro 1907 en Veliko Tŕrnovo. Esperanton li lernis en Ruse aŭtodidakte — laŭ la kvara eldono de la lernolibro de Atanas D. Atanasov. Tie Ŝopov membriĝis en la societo „Solidareco“, en kiu tiam — en 1925, estis la progresemaj urbaj esperantistoj. Poste li gvidis Esperanto-kursojn en lernejo, privataj kancelarioj kaj en 1927 — kursojn por komencantoj en la Laborista Klubo. Dekoj da liaj gekursanoj estiĝis bonaj esperantistoj.

En 1927 oni elektis lin vicprezidanto de „Solidareco“, kies prezidanto estis Belĉo Oktomvrijski. Laŭ decido de la kongreso en Vraca en 1928 la Centra Estraro de BEA translokiĝis en Ruse. Tie ankaŭ estis eldonata „Bulgara Esperantisto“. Ŝopov estiĝis unu el la redaktoroj kaj ĝia ununura korektisto. En la revuo oni prezigis ankaŭ liajn artikolojn. Samtempe li kunhelpis la eldonadon kaj korektadon de „Albumo de bulgaraj esperantistoj“ (1929), kies administranto kaj eldonisto estis B. Oktomvrijski. At. Ŝopov iniciatis en 1930 la fondon de junulara E-societo ĉe RMS (Laborista Junulara Unuiĝo). Unu jaron antaŭe, en 1929, en Sofio li partoprenis la fondon de BuLEA.

En 1937 Ŝopov translokiĝis en Plovdiv kaj estiĝis membro de societo „Kulturo“, kie dum 12 jaroj li daŭrigis sian aktivan E-agadon kiel provizora societa prezidanto, arda, entuziasmoplena kursgvidanto. Kelkan tempon li laboris en la E-presejo en Sofio, kie estis eldonataj la revuoj „Internacia Kulturo“ kaj „Internacia Jurnalisto“ (sub la redaktado de Asen Grigorov) kaj „Lernolibro“ de Iv. Sarafov.

Multaj plovdivaj geesperantistoj estas disĉiploj de At. Ŝopov. Ni neniam forgesos lian pretecon ĉiam hejpe, fari ĉion eblan por ke ni ellernu bone la Internacian Lingvon. Kvankam li malsanis dum la lastaj jaroj, ĝis la fino de sia vivo At. Ŝopov pensis pri Esperanto, vivis kun Esperanto.

Veselina KURTEVA

SUKCESPLENA PACKAMPANJO EN SOFIA LERNEJO

Ricevinte la laŭvican numeron 79-80/junio 1985 de revuo „La Verda Kolombo“ (Japanio), mian atenton tuj kaptis la publikigita en ĝi „Apelo el Hiroŝima kaj Nagasaki por totala malpermeso kaj elimino de nukleaj armiloj“. Traleginte ĝin per unu spiro, mi decidis popularigi ĝin en pluraj lernejoj, organizaĵoj kaj oficejoj en nia lando. Unua manifestis sian pretecon subteni la apelon la kolektivo de 118 Unueca Meza Politeknika Lernejo „Ljudmil Stojanov“ en Sofio.

Mi vizitis la vicedirektorinon de la lernejo s-inon Fakalieva. Ŝi montris ekskluzivan intereson al la apelo kaj akceptis volonte la proponon pri kolektado de subskriboj fare de gelnantoj kaj geinstruistoj.

S-ino Ĉolakova, prezidantino de la Lerneja Packonsilio, informis min, ke pere de la lerneja radioreto ĉiuj gelnantoj kaj geinstruistoj estis informitaj pri la organizita kampanjo. Volonte ĉiu donis sian subskribon, komprenante ke ĝi estos guteto en la oceano el milionoj da subskriboj, esprimantaj la firman volon de la subskribintoj batali por malpermeso kaj elimino de la nukleaj armiloj, por daŭra paco sur nia terglobo.

La apelon subskribis 2 038 personoj, el ili 1970 gelnantoj kaj 68 geinstruistoj.

En la nomo de MEM, mi esprimis dankon al la membroj de la lerneja Packonsilio kaj speciale al la prezidantino, s-ino Ĉolakova, kiu oferis multe da tempo kaj fortoj por realigi tiun noblan porpagan iniciaton.

Vasja CVETKOVA,
sekretario de MEM

Internacia literatura konkurso de „Bulgara Esperantisto“

Okaze de la 80-jariĝo de Bulgara Esperantista Asocio kaj de la 100-jara jubileo de Esperanto la redakcio de „Bulgara Esperantisto“ anoncas INTERNACIAN LITERATURAN KONKURSON.

La partoprenantoj en la konkurso rajtas prezenti verkojn el jenaj literaturaj ĝenroj:

- a) RAKONTO — ĝis 6 tajpitaj paĝoj
- b) ESEO — ĝis 3 tajpitaj paĝoj
- c) BIOGRAFIA SKIZO pri elstara aganto de la bulgara aŭ monda E-movado — ĝis 4 tajpitaj paĝoj
- ĉ) POEZIAJO

Ĉiu konkursaĵo estu inspirita de la ideo pri paca kunlaborado kaj kompreniĝo inter la popoloj.

La konkurso estas anonima. En la koverton, en kiu ili sendos sian konkursaĵon, la partoprenantoj devas enmeti alian pli malgrandan gluitan koverton, sur kiu ili skribu sian pseŭdonimon, kaj ene — sian ĝustan kompletan nomon, profesion kaj adreson.

Speciala ĵurio prijuĝos la literaturan valoron de ĉiu konkursaĵo.

Estos aljuĝitaj jenaj premioj:

a) POR RAKONTO:

- unua premio — 100 levoj
- dua premio — 80 levoj
- tria premio — 50 levoj

b) POR ESEO:

- unua premio — 80 levoj
- dua premio — 50 levoj
- tria premio — 30 levoj

c) POR BIOGRAFIA SKIZO de elstara E-aganto:

- unua premio — 80 levoj
- dua premio — 50 levoj
- tria premio — 30 levoj

ĉ) POR POEZIAJO:

- unua premio — 80 levoj
- dua premio — 50 levoj
- tria premio — 30 levoj

La konkursaĵojn oni sendu ĝis la 30-a de septembro 1986 (validas la poŝta stampo) al adreso:

BULGARIO, 1303-Sofio, Bulv. Ĥristo Botev, 97,

Redakcio de „Bulgara Esperantisto“ (por la literatura konkurso).

Al ĉiuj partoprenantoj ni deziras fruktodonan kreaĵon laboron kaj sukceson!

LA REDAKCIO DE „BULGARA ESPERANTISTO“

En la lando de lotusfloroj

(Daŭriĝo de n-ro 2/1986)

En la haveno oni ŝargis ŝipon per sojofabo. Mi intervjuis la havevenestron. Li diris iom fanfarone:

— En nia lando oni kulturas diversajn specojn de sojofabo — blanka, flava, nigra, verda kaj bruna. Nia ŝtato vendas grandajn kvantojn de ĝi al la ekstera mondo. Ni eksportas ankaŭ pork-kaj ŝafelojn, sekajn intestojn, lanugon, silkono, nigran kaj verdan, ovan pulvoron.

— Kaj kion oni importas?

— Plej diversajn varojn. Se ne mankas fremda valuto.

— Ĉu vi scias, kiu en nia lando unua veturis per biciklo? Tiu estis la lasta imperiestro de Qing-dinastio. Katolikaj misiistoj donacis biciklon al lia moŝto. Ĉiutage li biciklis en la reĝa parko kaj lian ekzemplon sekvis korteganoj kaj altrangaj oficistoj. Nun la iama

imperiestra veturilo estas posedaĵo de milionoj da ĉinoj. Nun ankaŭ la rikiŝoj veturigas klientojn per propraj rikiŝoj — bicikloj.

La vendoplaco troviĝas en la Norda strato.

— Tiu ĉi bazaro, — diris Lu Gang — ekzistas depost jarcentoj. Oni vendas bestojn kaj birdojn. Tre serĉataj estas la kolomboj.

Inter la vicoj de kaĝoj svarmis diversaj homoj. Multaj marĉandis — iuj vendis, aliaj aĉetis, triaj simple gapis. Lu Gang atentigis min pri altstatura viro. Li estis vestita en blua gabardina kostumo.

Lu Gang flustris al mi:

— Jen la fama aktoro Mej Lanfan. Li tre ŝatas kolombojn, ĉar ili vekas lin matene per sia pepado. . . Dum siaj liberaj horoj li ŝatas stari en la korto de sia domo kaj observi kiel la kolomboj peladas unu la alian super la tegmentoj.

Dum ni gapis, el nordo ekblovis

vento sableroplana. Ni rapidis al la kovrita bazaro Denan. Kun siaj sescent butikoj ĝi prezentas veran labirinton. La butikoj estas ŝtopitaj per diversaj artobjektoj el la tuta lando.

Tagmezo proksimiĝis, sed la malbona vetero faris la stratojn nevideblaj pro la grizaj polveroj, alblovataj flanke de la dezerto.

Ni decidis tagmanĝi en la bazara restoracio.

Ĝentila kelnero kondukis nin en apartan ĉambreton. Lu Gang rigardis en la menuokajeron kaj diris:

— Ni mem preparos kotletojn.

La kelnero alportis ardaĵpoton kaj metis ĝin sur la tablon antaŭ ni. Sur la poton li metis kaserolon. Kiam la akvo ekbolis, li alportis kotletojn de ŝafido kaj ni mem kuiris ilin.

Lu Gang montris, kiel oni preparas la kotletojn. Per du argentaj vergetoj li kaptas la viandon kaj trempas ĝin en la bolanta akvo. Post kelkaj minutoj ĝi estas kuirita. Denove per la vergetoj li kaptas

Enketo de „Bulgara Esperantisto“

Karaj legantoj,

Por plibonigi kaj pliriĉigi la enhavon de nia asocia organo „Bulgara Esperantisto“, la redakcio proponas al vi kelkajn demandojn kun peto respondi al ili plej sincere kaj objekte:

1. Kiuj el la publikigitaj lastatempe materialoj plej multe plaĉis al vi?
2. Kio ne plaĉas al vi en la revuo?
3. Kiajn materialojn vi ŝatus legi en niaj estontaj numeroj?
4. Viaj rekomendoj por plua plibonigo kaj variigo de la revuo?
5. Ĉu la materialoj en nia revuo kontentigas vin el vidpunkto de lingvo kaj stilo?

Ĉu ili estas facile kompreneblaj?

Bonvolu subskribi viajn respondojn per via kompleta nomo. Aldonu profesion, aĝon kaj ĝustan adreson!

Ni petas vin sendi viajn respondojn ĝis la 30-a de septembro 1986 laŭ adreso: Redakcio de „Bulgara Esperantisto“, Bulgario, 1303-Sofio, bulv. Hristo Botev 97 (por la enketo).

Estos treege utile por nia laboro, se vi amase kaj ĝustatempe respondos al niaj demandoj. Viaj opinioj kaj rekomendoj estos ĉiam bonvenaj, ankaŭ post la enketo.

Anticipan dankon!

LA REDAKCIO DE „BULGARA ESPERANTISTO“

NOVAJ LIBROJ

Murgin, Canko: Progresemaĵoj momentoj en la ideologio de L. L. Zamenhof. Kolekto de studoj. Red.: Ivan Keremidĉiev-Esperov. Eld.: BEA, 1985. p. 67. Prezo: 0,67 lv.

En tiu ĉi kolekto Canko Murgin detale esploras kiel disvolviĝis la mondkoncepto de Zamenhof. La libro estas necesa por ĉiuj, kiuj deziras pli bone ekkoni la ideologion de la iniciatoro de Esperanto.

Stanev, Emilian: Stelisto de persikoj. Elektitaj noveloj kaj rakontoj. Kompilis: Petăr Todorov. Trad.: Asen Grigorov. Eld.: Sofia Pres, 1985, p. 130.

La libro enhavas la plej bonajn novelojn kaj rakontojn de la majstro de bulgara prozo Emilian Stanev. La trafe elektitaj noveloj kaj la bonega traduko

ebligas al la E-legantoj ĝui la elegantan stilon kaj la allogan rakontmanieron de la konata verkisto.

Penev, Penjo: Homoj, antaŭen! Kompilis: Nikola Pilev. Red.: Violin Oljanov. Eld.: BEA, 1986, p. 103.

La poemaro de la talenta bulgara poeto P. Penev estas eldonita helpe al la partoprenantoj en la 19-a Revuo de Esperanto-Parolo kaj Kanto. Ĝi enhavas la plej konatajn poemojn de la poeto, bonege tradukitaj en Esperanto.

Gilbert, William: Pri landnomoj en Esperanto. Red.: Nikola Aleksiev. Eld.: HEA kaj BEA, 1985, p. 12.

La aŭtoro ekzamenas la demandon sen antaŭjuĝoj, celante doni realan solvon de unu el la plej diskutataj problemoj en Esperanto.

G. M.

la kotleton kaj metas ĝin en tomat- aŭ en ajlosaŭcon. Mi iom mallerte sekvis lian ekzemplon.

— Tiu ĉi plado — klarigis Lu Gang — estas nomata joan-jo. Ĝin inventis la mez-aziaj minoritatoj. Vi certe ne scias, ke sur ĉina tero loĝas pli ol cent minoritatoj.

Dum ni manĝis, kelkaj muŝoj zumis ĉirkaŭ nia tablo. La kelnero atakis ilin per vipeto. Lu Gang diris:

— Dum la milito furiozis sur la Korea Duoninsulo, usonaj aviadistoj superŝutis nian landon per infektaj kuloj kaj muŝoj. Por savi sin de malsanoj — ĥolero kaj pesto — ni ekstermis ĉiujn kulojn kaj muŝojn. La kelnero, kiu priservas nin, fanfaronas, ke li sola mortigis kvindek mil insektojn...

La vento ĉesis blovi, la polvo kuŝis sur la stratoj kaj tegmentoj kaj ni forlasis la bazon por vidi malnovajn domojn, konservitajn kiel muzeaj antikvaĵoj.

— En malnova Ĉinio — rakontis Lu Gang — la domkonstruado estis severe reglamentita. Nur la

imperiestro kaj liaj parencoj havis la privilegion konstrui domon pli altan ol unu etaĝo.

Ni haltis antaŭ ruĝa pordego. Ambaŭflanke staris skulptaĵoj — ŝtonaj leonfiguroj.


— En tiu domo loĝis bonstata urbano, — diris Lu Gang.

— Pro kio la ruĝa koloro?

— La ruĝa koloro estas simbolo de feliĉo. Ĉiuj palacoj, temploj, publikaj konstruaĵoj kaj privataj domoj estas ruĝkoloraj.

Ni eniris en la korton kaj la gardisto montris al ni la salondon por gastoj kaj la ĉambrojn por infanoj kaj geedzoj.

Pekino estas fama per siaj artkaj arkitekturmuzeoj. Unu el ili estas la muzeo Gugung — trezorejo de ĉina pentro- kaj aplikata arto. En la belarta pavilono oni montris al ni ĉefverkojn de pentristoj el la Tang-disnastio (618—907). Tiu-tempe oni eltrovis la naturpejzaĝon, portretojn kaj aliajn ĝenrojn. Ankoraŭ pli brilajn sukcesojn havis la pentroarto dum la Song-disnastio (960—1279) Ni vidis la rulpentra-



La Granda Ĉina Muro ĉe Czinŝanlin

KOMPUTILO EN BEA

Ekde septembro pasintjare Bulgara Esperantista Asocio havas sian propran mikrokomputilon „Pravec-82“, produktitan en la Uzino por Elektronika Kalkultekniko en urbo Pravec. La komputilo priservos ĉiujn filiojn de la asocio: Centran Estraron, Internacian Esperanto-Kursejon, distriktajn estrarojn en la tuta lando, k. a. Nun oni preparas la unuajn programojn por komputiloj. Kun peto rakonti al niaj legantoj pri tiu preparlaboro ni turnis nin al la komputistino Svetlana Kirovska:

Pere de la unua programo oni kolektos kaj sistemigos datumojn pri la respondecaj kadruoj de nia asocio: nomo, aĝo, adreso, klereco, staĝo en la E-movado, posteno, nunaj kaj iamaj postenoj de estrararo en la asocio, grado de lingvoposedo, kiujn E-eldonaĵojn abonas, membrado en diversaj internaciaj organizaĵoj ktp. En la memoron de la komputilo oni povas enkonduki ankaŭ datumojn pri aktivaj esperantistoj, perspektivaj kiel estontaj estraranoj. La bazo de la programo jam estas kreita. Nun ni preparas enketilojn por kolekti la bezonatan informon. La donitaĵojn, kiujn ili enhavos, ni inkludos en la memoron de la komputilo, fiksante ilin sur la komputilan magnetdiskon. Se la distriktaj estraroj de BEA sendos ĝustatempe — ĝis la fino de marto — la preparitajn de ili enketilojn, la programo estos preta fine de junio j. k. Poste ni plivastigos tiun programon kaj

ĝi ampleksos donitaĵojn pri ĉiuj membroj de BEA. Tiamaniere ni povos kontroli la uniĝon aŭ maljuniĝon de nia asocio. Ni ricevos ĝustan informon pri la nombro de la partoprenantoj en la landa E-movado. Tiam oni povos prepari la novajn membro-kartojn de niaj esperantistoj.

La dua programo, kiu ankaŭ estos baldaŭ preta, informos pri esperantistoj finintaj la trian kaj la metodikan instrugradon de lingva posedo. Tio estas la homoj, al kiuj povus sin turni la organizantoj de diversaj E-kursoj. La komputilo memorfiksos ankaŭ la staĝon de la esperantistoj-kursgvidantoj.

La tria programo, kiu jam funkcias, priservos la Internacian Esperanto-Kursejon. Ĝi donas informon pri ĉiuj bulgaroj, kiuj pere de Esperanto vojaĝas eksterlanden kaj pri la alilandanoj, kiuj vizitas Bulgarion cele de ellernado de Esperanto. La programo enhavas ankoraŭ iujn kontakto-operaciojn.

La kvara programo ankaŭ priservos la bezonojn de la kursejo kaj inkludas la financajn operaciojn de ĝiaj filioj en Pisanica kaj Varna.

La komputilo en nia asocio jam estas fakto. Sed ĝia utila uzado nun dependas de la aktiveco fare de la esperantistoj el ĉiuj filioj de BEA. Lige kun siaj oficaĵoj bezonoj ili povas komisi preparadon de diversaj programoj, kiuj ne nur plifaciligos la laboron, sed garantios rapidecon kaj precizecon ĉe prilaboro de la informoj. Pri problemoj, kiuj vin interresas, vi povas vin turni al la Internacia Esperanto-Kursejo (Sofio), kie troviĝas kaj funkcias la komputilo.

Maria JANKOVA

ĵojn „Nokta festeno“ kaj „Popolfesto ĉe rivero Bianhe“. En ĉi lasta rulpentraĵo la majstro pentris pli ol 500 figurojn de homoj, kvindek bestojn — bovinoj, kameloj, ĉevaloj kaj azenoj.

Kun admiro mi observis la templon Riĉa Rikolto en la parko Ĉiela Altaro. Ĝi situas meze de cipresa arbaro. La ĉefa konstruaĵo estas ronda templo, kiu la tuta estas kunmetita el ligno, sen unu najlo. Dum suna tago la kupolo el blua fajenco ŝajnas diafana. Ĝi siatempe estis loko, kie imperiestroj preĝis por riĉa rikolto.

Proksime de la templo inter cedroj centjaraj troviĝas ankoraŭ du mirakloj: marmora ronda teraso, kiu plilaluitigas la homan voĉon kaj paŝojn, kaj idolejo duonĉirkaŭita de muro longa 200 metrojn. Se du personoj ekstaras ĉe ambaŭ flankoj de la muro, ili povas interparoli frustre kiel per telefono.

Ni vizitis ankaŭ la someran restadejon de la imperiestro. Por ĝia konstruo la lasta imperiestro de Qing-dinastio Zi Si elspezis tri milionojn da kilogramoj da arĝento — sumo kolektita por konstruo de militŝiparo. La somera restadejo ampleksas terenon de tri mil dekaroj. Tie estas konstruitaj



La danco „Legenda birdo“

artefarita lago, temploj, pavilonoj kun murpentraĵoj, lignoskulptaĵoj, arkoj, artefarita monteto ktp.

De sur la supro de la artefarita monteto ni ĉirkaŭrigardis. Ĉiuj tegmentoj estas kovritaj per blujaj, verdaj kaj orkoloraj tegoloj. En la lago kuŝas jaĥto el marmoro. Ĉirkaŭ la bordo de la lago kreskas nelumbioj ruĝkoloraj.

En granda pavilono estas elmetitaj objektoj donacitaj al la impe-

riestrino: orumita palankeno, fajencaj vazoj, arĝentaj modeloj de ŝipoj kaj boatoj, rulpentraĵoj el antikvaj tempoj.

La pavilono kun murpentraĵoj, prezentantaj pejzaĝojn, estas longa 380 metrojn!

La gardisto ĉe la enirejo informis nin, ke granda parto de la trezoroj estas ŝtelitaj de la generaloj de Ĉang Kajŝi. Ankaŭ la detronigita imperiestro forportis diamantojn,

La Esperanto-bibliotekoj

Mi konas dekon da gebulgaroj, kiuj posedas riĉajn Esperanto-bibliotekojn. Eĉ estas esperantistaj familioj, en kiuj estas po du apartaj Esperanto-bibliotekoj. Du bibliotekojn havas la familio Damjanov en Kazanlâk. Unu el ili apartenas al la patro kaj la dua al la filino.

La esperantistoj, kiuj havas riĉajn Esperanto-bibliotekojn, dum longa tempo penis kaj ankaŭ nun klopodas havigi al si noveaperantajn librojn. Krome ili ofte korespondas kun geesperantistoj el Bulgario kaj alilando, por interŝangi siajn duoblaĵojn.

La posedantoj de Esperanto-bibliotekoj kaj la legantoj de Esperanto-literaturo estas la plej entuziasmaj, la plej aktivaj kaj fidelaj esperantistoj. La plimulto el ili bone posedas la lingvon kaj ofte prelegas. Konsiderante la fakton, ke ĉe ni pro diversaj kaŭzoj oni ne povas facile aĉeti Esperanto-librojn, aperantajn en eksterlando, oni povas kompensi tion per estabdo de bone funkciaj publikaj Esperanto-bibliotekoj. Ni ĉiuj scias, ke la biblioteko de la Londona Esperanto-Societo havas pli ol 30 000 titolojn. Mi vidis la bibliotekon de la Esperanto-Societo en Prago, Ĉeĥoslovakio, kiu entenas pli ol 4 000 librojn. Ĉe iuj bulgaraj distriktaj Esperanto-organizaĵoj kaj viglaj societoj ankaŭ funkcias relative riĉaj bibliotekoj. Oni penas liveri novajn librojn, bindi

ilin kaj ĉefe — konvinki la esperantistaron pruntepreni kaj legi librojn.

En Sofio aktive agas la urba Esperanto-organizaĵo. Ĝi havas 21 societojn. En la kadro de la organizaĵo funkcias tre aktive Esperanto-Domo de Kulturo „M. Gorkij“. Tamen neniu el la supre cititaj organizaĵoj havas bibliotekon. Neniu la geesperantistoj en Sofio povas pruntepreni por legado hejme esperantaĵojn aŭ tralegi Esperanto-revuon aŭ gazeton, kiun oni ne povas aboni en nia lando.

Tiun ĉi mankon oni devas tuj plenigi, se ni deziras, ke la gesamideanoj ekposedu pli bone la lingvon. Ni ne havos bonajn kaj spertajn geesperantistojn, se ni ne sukcesos solvi la problemon pri aperigo de bonaj Esperanto-lerniloj kaj abunda livero de literaturo por legado. La publikaj Esperanto-bibliotekoj tiurilate ludas gravan rolon kaj neniu rajtas neglekti tiun aferon. Bona kaj imitinda ekzemplo por ni tiurilate estas la bulgaraj publikaj legejoj.

Oni devas konstante kaj malavare helpi la agadon de la publikaj Esperanto-legejoj. Esperanto-organizaĵo sen vigle funkcia biblioteko ne povas esti nomita aktiva aŭ modela.

Mi esperas, ke la estraro de la Urba Esperanto-Organizaĵo en Sofio rapide likvidos sian postrestadon tiurilate kompare kun multaj aliaj niaj organizaĵoj, kiuj havas pli modestajn financajn kaj aliajn rimedojn, sed posedas riĉajn bibliotekojn.

Nikola NIKOLOV. Sofio

oron kaj argenton. Pro tio la somera restadejo ne estas tiel riĉa je trezoroj, kiel oni supozas.

LA GRANDA ĈINA MURO

Ĉiu, kiu vizitas Pekinon, ordinara fremdulo aŭ regnestro, veturas al la Granda Ĉina Muro, ĉar la distanco inter ĝi kaj Pekino ne estas granda.

Iun matenon ni kun Lu Gang okupis lokon en malnova kupeo. La trajno unue kuris tra ebenaĵo, poste eniris la intermonton Zujungang. Ĉe la stacio Nankou oni alkoĉis duan lokomotivon. La du vapormaŝinoj kune ektiris la vagonojn preter rapidflua rivero, inter sablaj krutaĵoj kaj rokoj. Ni elvagoniĝis sur stacio Qinglungziao kaj grimpis al la trapasejo, kie elstaris fortikaĵo. Enirinte la fortikaĵon, laŭ ŝtona ŝtuparo ni supreniris la muron, kiu etendiĝas sur la montokresto Badaling. La muro estas sufiĉe larĝa. Inter la embrazuroj povas renkonte preterpasi du veturiloj.

La ekskursgvidanto, kiu deĵoris sur la murego, rakontis:

— La granda murego komenciĝas en oriento ĉe Liayuguan kaj finiĝas en okcidento ĉe Shanhaiguan. Kune kun la deflankiĝoj, ĝi longas pli ol kvin mil kilometrojn. La fundamento

de la murego estas metita antaŭ pli ol du mil jaroj kiel ŝirmo kontraŭ rabemaj gentoj. Ĝi estas alta sep metrojn kaj larĝa ses metrojn. La murego estas konstruita el ŝtonblokoj kaj brikoj. Interne de la murego estas enŝutita gruzo kaj teraĵo. Ankaŭ la mortintojn oni entombigis inter la murego. Estas kalkulite, ke por konstruo de la murego estis uzitaj 700 milionoj da labortagoj, sed neniu povas kalkuli kiom multaj homoj laboris en la ŝtonrompejoj kaj en la brikfarejoj, kiuj troviĝas tre malproksime de la murego — sur duoninsulo Ŝandong.

Ekzistas multaj legendoj pri la murego. Jen unu el ili. Vilaĝano Min Ŝang-ŭi atendis la revenon de sia edzo tutajn dek jarojn. Ĉar li ne revenis, ŝi iris serĉi lin tra valoj kaj montoj. Kiam ŝi atingis la muregon, ĝi jam estis finkonstruita. Min Ŝang-ŭi demandis pri sia edzo. Oni diris al ŝi, ke li estas mortinta kaj oni enterigis lin sub la muro, sed kie ĝuste, neniu sciis. Ŝi longe restis ĉe la murego kaj ploradis. La ĉielo kompatis ŝin kaj per fulmo detruis iun lokon de la muro, kie kuŝis ŝia morta edzo. ...

— Kvankam la murego kostis la vivon de milionoj da homoj, ni fieras pri ĝi — diris Lu Gang, rakontinte la legendon. Tiu ĉi murego

go allogas milojn da turistoj el la tuta mondo.

Reveninte de la ekskurso, oni invitis min al bankedo. La ĉefa plado estis pekina (rostita) anaso. Ĝia rostado okazis antaŭ miaj okuloj. Oni metis ĝin en forte varmigatan fornon. Baldaŭ ĝi ruĝiĝis kaj estis mangopreta. La kelnero metis ĝin sur telero, sed mi ne sciis kiel ĝin manĝi. Lu Gang prenis tranĉilon, detrancis peceton kaj volvis ĝin en pastofolio, trempis la tuton en saŭco kaj ŝovis en sian buŝon. Mi sekvis lian ekzemplon. Lu Gang diris:

— La rostita anaso estis reĝa manĝaĵo, sed nun ĝi estas popola plado.

Post la bankedo, kiu kiel kutime estis abunda, Lu Gang proponis ke ni vizitu cirkon.

— Vi ne bedaŭros, — diris li, estos tre interese. — La cirko en nia lando havas dumiljaran historion. La unuaj cirkaj arlekenoj puŝadis unu la alian per kornoj, pro tio en ĉina lingvo cirko signifas kornopuŝadon.

En la salono de la hotelo ni trovis dekojn da fremduloj, venintaj por vidi ĉinajn cirkarton.

(Daŭrigota)
HO MO GO

Zamenhofaj festotagoj

Lige kun la 126-a naskiĝtago de la iniciatinto de Esperanto d-ro L. L. Zamenhof, en nia redakcio ne ĉesas veni multaj informoj pri Zamenhofaj solenaj en diversaj loĝlokoj en la lando. Niaj korespondantoj informas pri interesaj iniciatoj tiurilate.

BANKJA. En la tagoj antaŭ la 15-a de decembro 1985 la membroj de la loka E-societo plantis 126 tiliojn en la Esperantista Arbaro apud la urbo. Honore al la XIII Kongreso de BKP ĉiu esperantisto plantis po 13 tiliojn.

La 7-an kaj 8-an de decembro en la urbo naskiĝis nova tradicio. La majstro de sporto Georgi Granĉarov kaj la kandidat-majstro de sporto inĝ. Vasil Kosaĉki okazigis ŝak-turniron kun la partopreno de konkurantoj el la ĉefurbaj teamoj „Slavia“ kaj „Levski-Spartak“.

Boris ATANASOV

JAMBOL. La 30-an de novembro en la montodomo sur Bakaĝiko okazis distrikta E-renkontiĝo, dediĉita al la 126-a naskiĝtago de Zamenhof. La renkontiĝon ĉeestis pli ol 200 geesperantistoj el Jambol kaj la distrikto. Gastis grupo da samideanoj el Sliven.

Raporton pri la vivo kaj agado de Zamenhof tralegis la vicprezidanto de DE de BEA D. Ĥristov. Poste estis prezentita riĉenhava literatur-muzika programo kun kvizo kaj loterio.

**Iljana ILIEVA
Stojan POPOV**

PLEVEN. En la festvespero okaze de la naskiĝtago de d-ro Zamenhof, organizita de la Distrikta kaj Urba Estraroj de BEA, pri la vivo kaj agado de la iniciatinto de Esperanto parolis la prezidantino de DE de BEA Vâlka Dobрева. La E-veterano Angel Simeonov parolis pri la testamento de Zamenhof — la lingvo evoluis, sed oni ne komplikigu ĝin, ne malfaciligu ĝian lernadon. Amatoraj artistoj-esperantistoj plenumis interesan programon.

Dimităr KAMENOPOLSKI

SMOLJAN. Lige kun la 126-jara datreveno de la naskiĝo de d-ro Zamenhof, la 15-an de decembro 1985 en la Internacia Esperanto-Kursejo (vilaĝo Pisanica) la urba E-societo „Kulturo“ organizis grandan solenan celebron pri la vivo kaj kreado de Zamenhof kaj pri la disvolviĝo de la monda Esperanto-movado. Parolis Boris Angelov — E-veterano kaj aktivulo. Li dividis ankaŭ siajn impresojn pri la 70 UK en Augsburg. Li montris belegan ekspozicion el bildoj kaj poŝtmarkoj — senditaj de liaj eksterlandaj amikoj.

La ĉeestantoj ĝuis belartan programon.

Biser ANGELOV

SOFIO. Laŭtradicie la Urba Estraro de BEA celebris la 126-an datrevenon de d-ro Zamenhof. Tiu solenaĵo okazis en la belega salono de la ĉefurba klubejo de transportaj laboristoj. Ĉeestis ĉirkaŭ 100 geesperantistoj. Haim Levi el la kulturcentro „M. Gorkij“ bonvenigis la ĉeestantojn esperante kaj bulgare.

La 90-jara veterano de la landa E-movado Georgi Simeonov el Vidin salutis la samideanojn kaj bondeziris al ili atingi lian estimindan aĝon kaj labori kiel li (pli ol 70 jarojn) por la noblaj idealoj de Esperanto.

La ĉeestantoj volonte subskribis la „Apelon el Hiroŝima kaj Nagasaki por totala malpermeso kaj elimino de nukleaj armiloj“.

Vasja CVETKOVA

ŜUMEN. La lokaj esperantistoj solene celebris la naskiĝtagon de d-ro Zamenhof.

Paroladon pri la granda homamanto faris la sekretario de societo „Vekiĝo“ Ĥristo Tonev. La aktiva batalanto kontraŭ faŝismo kaj kapitalismo kaj veterano Atanas Bojaĝiev, rakontis pri la aktiva partopreno de la esperantistaro en Ŝumen kaj el la distrikto en la defendo de la herooa vjetnama popolo kaj pri diversaj pacaj iniciatoj.

Kun granda ĝojo oni eksciis pri la distingo de societo „Vekiĝo“, okaze de ĝia 80-a jubileo kaj pro porpaca aktivado kun la honoraj diplomo kaj insigno de MEM. Tiu alta distingo ĝis nun estas aljuĝita nur al kelkaj esperantaj organizoj kaj grupoj en la mondo kaj estas ununura en nia lando.

Cvjatko TODOROV

Poezio

MI GLORAS AMIKECON

Al miaj bulgaraj geamikoj

Ho geamikoj, foraj kaj proksimaj,
en la vastega mondo disĵetitaj —
kiel la steloj sur la volb' ĉiela!
Pri renkontiĝoj novaj sopirante,
al vi plej bonajn pensojn sendas mi.

La vojoj al amikoj-samcelanoj
instruas nin pli inde, plenvalore
en nia mondo ŝtormoplena vivi,
kaj ĉiam pliriĉigas nin spirite,
largigas la animan mondon pli kaj pli.

De l'vera Amikeco vojoj foraj
devigas nin al la memperfektiĝo,
al noblaj agoj kaj purec' de l'pensoj. . .
Ni ĉiam kreu nin, senlace, senripoze,
kaj nin kreadu Temp', dum kiu vivas ni.

La vojoj al amikoj korproksimaj, —
ho kiel multe ili donas al la homoj,
se vere Homoj — ne amebaj dupiedaj —
estas ni. . .

**Nadija ANDRIANOVA
Kievo, USSR**

NENIAM MOSKVO TROMPOS HOMESPERON

Malkaŝe diros mi
kun bonhumor':
Varmigos mia Moskvo
ĉies kor'.
Neniam Moskvo
trompos homesperon,
Amikan manon
ĝi etendos kun sincero.
Ho junular' —
de la Planed' esper' —
Vi unuĝu
kaj forgesu pri sufer',
la densan nigran nubon pelu for
kaj pacon belan
plifortigu kun fervor'!
Mi kredas en la revo,
amikec'.
Mi kredas en la bono
kaj belec'.
Paco, sur Tero
de l'mizer' kaj riĉ'
Suferojn ĉiujn
anstataŭu per feliĉ'!

**Esperantigis: Nadija Andrianova
Svetlana TOLSTENOK**

VIGLIGO DE LA E-MOVADO EN RAZGRAD

Razgrad jam havas siajn tradiciojn en la organizado de esperantaj kulturaj iniciatoj, pri kiuj jam interesiĝas ankaŭ neesperantistoj el la regiono. Konata en la urbo estas la Distrikta Estraro de BEA kun ĝia prezidanto d-ro Ivan Kirčev, ankaŭ la Esperantista Kulturdomo kaj ĝiaj interesaj iniciatoj. Aplikante plej modernajn metodojn de propagando, la lokaj esperantistoj-aktivuloj verbas novajn adeptojn kaj amikojn de Esperanto inter membroj de kulturaj kaj amasaj organizoj. La distrikta E-organizo ĝuas aŭtoritaton antaŭ la lokaj instancoj, kiuj ĉiam estas pretaj helpi al DE de BEA solvi organizajn kaj aliajn problemojn.

Oni entuziasme sin preparas por partopreno en la XIX Nacia Revuo de Esperanto-Parolo kaj Kanto, kiu okazos en Razgrad de la 31-a de marto ĝis la 2-a de aprilo j.k. Ties organizantoj estas DE de BEA en Razgrad kaj la Junulara Sekcio ĉe BEA. Oni realigas la programon kunlabore kun la vicprezidanto de Distrikta Popola Konsilantaro Gančo Dobrev kaj kun la Distrikta Konsilantaro pri Kulturo. La Distrikta Estraro planas bonajn iniciatojn por konigi al la partoprenantoj la unikajn antikvajn vidindaĵojn de urbo Razgrad — la antikva romia urbo Abritus kaj ĝia monera trezoro, valoraj traciaj trovaĵoj. Vizito de la pitoreskaj etnografiaj kompleksoj en la vilaĝoj Topčij kaj Pobit Kamak estos interesa por la ŝatantoj de la malnovaj bulgaraj kutimoj, tipaj por tiu regiono. La renesanca bulgara kulturo konserviĝis ankaŭ en la malnova romantika urboparto Varoša.

Konataj pentristoj kaj artfakuloj en Razgrad jam okupiĝas pri la propagandaj materialoj kaj pri la distra programo. En la Distrikta Centro „Standardo de la Paco“ estos organizita ekspozicio el pentraĵoj de infanoj-esperantistoj el la tuta lando, dediĉitaj al la paco.

Jam bolas la preparado en ĉiuj E-societoj en la lando. Sendube dum la revuo la junaj esperantistoj strebos prezenti siajn plej bonajn atingojn en ekposedo de la Internacia Lingvo kaj en la amatora aktivado.

Do, sukcesan laboron kaj ĝis revido en Razgrad!

Cvetka MITEVA,
prezidantino de la Junulara Sekcio ĉe BEA

KUN GRANDA GOJO

Dum la lastaj tagoj de la pasinta jaro la junpioniroj el la elementa lernejo „Ivan Vazov“ en la bela vilaĝeto Iglika — distrikto de Sumen, travivis grandan ĝojon. La leterportisto alportis belan, multkoloran koverton kaj sur ĝi estis gluitaj multaj interesaj poŝtmar-

koj. Ĝi estis veninta el la malproksima granda sovetia urbo Vladivostok. Kiam la infanoj ekvidis la senditajn bildkartojn kaj poŝtmarkojn, dediĉitajn al la paco kaj al la XII Monda Festivalo de Junularo, Moskvo, somere en 1985, granda estis ilia feliĉo. Sur la dorso de ĉiu bildkarto estis skribitaj kortuŝaj novjaraj bondeziroj, vortoj pri la paco kaj la nomo de adresatoj — la junpioniroj-pentristoj: Neli Hankova, Galina Martinova, Biser Eftimov, Nina Serafimova kaj Galja Hristova. Per siaj pentraĵoj: „Vagonaro de l'amikeco“, „Kolomboj de l'paco“, „Mia naskiĝvilaĝo“ k. a., ili partoprenis la internacian ekspozicion, dediĉitan al la paco kaj al la festivalo en Moskvo, organizitan de la Vladivostoka E-Klubo „Pacifiko“ kaj de la Junulara Domo en la urbo. Por la bona preparado de la pentraĵoj kaj ilia sendado meriton havas la klasestrino Nikolina Ljubenova kaj la direktorino Genoveva Boŝnakova. Dum la lernojaro 1984/85 ili vizitadis la tuturban kurson por komencantoj, organizitan de societo „Vekiĝo“.

Cvjatko TODOROV

NOVA LERNEJANA KLUBO



La 21-an de novembro en la lingva lernejo en urbo Smoljan okazis solenaĵo lige kun la fondo de esperantista lerneja klubo. Ĉeestis Ivanka Bekrieva, direktorino de la lernejo. La klubanojn — pli ol 40 ĝelernantojn el diversaj klasoj, gvidas Genka Plesneva. La junaj esperantistoj rakontis pri la vivo de Zamenhof, pri la distrikta E-movado kaj prezentis riĉan artan programon en Esperanto. Julia Haĝieva — sekretariino de DE de BEA, enmanigis atestilojn al la klubanoj kaj substrekiis, ke la unuaj sukcesoj devas esti bazo por estontaj pli gravaj atingoj en la esperanta laboro. Ivanka Bekrieva, agrable surprizita, gratulis la novajn esperantistojn kaj promesis protekti ilian noblan lernejan agadon.

J. H.

Spuroj sur la neĝo

NIKOLA STATKOV

NIKOLA STATKOV estas juna bulgara verkisto kaj amikp de Esperanto. Al lia plumo apartenas du volumoj de rakontoj el la vilaĝana vivo — „La mensogo, ke oni vivis“ kaj „De dio al la diablo“ kaj multaj rakontoj, publikigitaj en diversaj periodaĵoj.

Ĉi-sube ni proponas al nia legantaro lian rakonton „Spuroj sur la neĝo“, speciale verkitan por „Bulgara Esperantisto“.

Kial ŝi sendis tiam la versaĵojn, kial?

Jam centfoje, milfoje faris al si tiun ĉi demandon Viktoria. Sidante senokupe en la flughavena atendejo, ŝi havis sufiĉe da tempo por tio — la aviadilo malfruigis. Kaj kiom pli multe ŝi pensis pri tiu historio, des pli klare ŝi sentis sian kulpon — kulpo elvokinta ĉe ŝi la rememoron pri tempo jam delonge forpasinta.

Cu ne sufiĉis al ŝi la korespondado kun la maljunulo el Prago? En siaj leteroj ili rakontis unu al la alia okazintaĵojn el sia infanaĝo kaj el la junaj jaroj, kuraĝigis kaj konsolis sin reciproke, por povi pli facile elteni la neeviteblan malĝojon de la maljunaj jaroj. Ĝi estis amikeco de du parencaj animoj, kiujn preskaŭ sep jardekojn tordis la ventoj de la tempo. Ili ambaŭ estis soluloj trapasintaj sian vojon sur la tero sen zorgoj kaj ĝojoj pri infanoj kaj nepoj, sen la ĉiama memkonsolo, ke ili jam foriris el la vivo, sed lasas post si vivi karnon el sia karno, por ke plu floru la familia arbo. Kvin jarojn daŭris tiu korespondado. Iliaj leteroj estis pli ofte malgajaj — ja ĉiu el ili sciis, ke frue aŭ malfrue, iun tagon tiu kvieti amikeco ĉesos — unu el ili ne skribos laŭvican leteron, aŭ ne ricevos respondon de la alia. Tiel estis ĝis tiu malbenita tago dum la pasinta somero.

Foje ŝi sentis emon trarigardi siajn malnovajn librojn, kiuj jam delonge kuŝis en kestego en la subtegmento. Foliumante iun el ili, ŝi trovis paperfolion kun versoj kiujn ŝi skribis antaŭ kvindek jaroj. Ili estis krio de ŝia animo — de neniu aŭdita, de neniu legita. Ŝi skribis ilin en la nokto, kiam Li forlasis ŝin. Ŝi trovis la versojn, kuŝintajn senutile tiom da tempo kaj anstataŭ lasi ilin tie, kie ili estis, ŝi tradukis ilin en Esperanton kaj sendis al la redakcio de iu esperanta revuo. La versaĵo estis

publikigita. Kelkajn monatojn pli malfrue ŝi ricevis leteron el Zuriko. Iu viro, same esperantisto, skribis al ŝi, ke ŝiaj versoj ege plaĉis al li. Li verkis muzikon laŭ ili, ian romancon, kaj li volis ekscii pli multe pri ŝi. Ŝi respondis al tiu letero. Sed ne skribis al li, ke ŝi havas jam preskaŭ sepdek jarojn, ke la versojn ŝi verkis antaŭ duonjarcento. Ŝi prisilentis kaj sian aĝon, kaj tiun de la versoj — pro vanteco, pro konfuzo konfesi, ke maljuna virino kiel ŝi frivole elmontras la emociojn de siaj junaj jaroj. Post nelonge ŝi ricevis duan leteron. En ĝi estis foto de juna viro kun hela vizaĝo kaj bluaj okuloj, ridetanta gaje kaj amikeme. „Viaj versoj estas belegaj. Vi estas vera poetino, kredu min, vin atendas brila estonteco. Vi eĉ ne supozas, kiom talenta vi estas. Mi estos feliĉa legi aliajn viajn versaĵojn; ankaŭ laŭ ili mi verkos muzikon. Mi atendas vian respondon. Kaj foton, se eble... por ke mi vidu la virinon, kiu versas tiel majstre kaj suferas tiel profunde—li skribis

Ĉi-foje ŝi longe hezitis. La unua mensogo postulis pliajn mensogojn. Ŝi devas ĉesigi tiun ludon, ne estas bone daŭrigi tiel. Sed ŝi ne ĉesis. Al ŝi estis agrable, ke li skribas laŭde pri ŝiaj versoj, ke volas havi ŝian foton, profunde en ŝia animo ekmoviĝis sentoj, jam delonge estingigitaj, delonge forgesitaj... Ŝi respondis. Kaj denove — eĉ ne unu vorton pri sia aĝo. Ŝi dankis pro la foto. Kaj sendis la sian. Ĝi estis ŝia foto de la studentaj jaroj, iom senkoloriginta, sed la junulino sur ĝi estis bela kiel ikono. Ŝi volis meti finon al tiu danĝera ludo, sed denove cedis al la tento. Siaj leteroj flugis al li, la mensogoj amasiĝis. Ŝi sciis, ke la karesaj vortoj de la komponisto estis por la junulino sur la foto, sed al ŝi estis agrable multfoje legi kaj relegi ilin ĉiutage. „Kara Viktoria...“ Tiel komenciĝis ĉiu lia letero. Estis momentoj, kiam ŝi preskaŭ kredis, ke ĉiuj ĉi karesaj vortoj vere estas eldiritaj por ŝi. Tiam ŝi starigis antaŭ la spegulo. Maldensa griza hararo, malgajaj okuloj — sen brilo, sen koloro, sensangaj vangoj, velkintaj palaj lipoj...

La leteroj de la komponisto estis direktitaj al ŝi... kiam ŝi estis antaŭ kvindek jaroj, sed ŝi ne ĉesis ricevi ilin, plu respondis al ili. Ja sur la koverto estas ŝia nomo, sur la folio-letero — same. Ja, ŝi

estis iam tiu juna kaj bela knabino. Ŝi estis, kaj ankoraŭ estas, sed fakte ne plu estas... Cu ŝi amis tiun viron? Ne, li povis esti al ŝi filo. Sed tiel agrable estis scii, ke li amas ŝin, ke ŝi estas amata, kvankam ŝi ne plu estas ŝi... La forgesita tremo de la junecca tempo ekregis ŝin kaj ŝi lasis sin al tiu tremo, kiu ekscitis ŝian animon...

Tiel pasis la tempo. Sed iun matenon alvenis telegramo — la komponisto sciigis, ke li alflugas la saman tagon per la aviadilo el Zuriko. La novaĵo konsternis ŝin. Sed pripensinte pli trankvile, ŝi decidis diri al li, ke Viktoria estas ŝia nepino; ke ŝi forveturis antaŭ unu semajno al eksterlando — ja li ne avertis pri sia alveno; ke ŝi revenos post unu monato, eble eĉ pli malfrue. Poste... Poste li forveturos kaj ŝi ne plu skribos al li.

Kial ŝi sendis tiam la versaĵojn, kial?

Ŝi tuj rekonis lin. Rapide kaj kompateme diris al li pri la „nepino“, prenis taksion kaj kondukis lin al sia hejmo. Li restos nur tri tagojn, li diris, ĝis la sekva aviadilo al Zuriko — ja Viktoria forestas. Ankaŭ la avino estas Viktoria? Bonege! Turnante sin al ŝi, li pensos pri la nepino...

En la gastĉambro li vidis la pianon kaj tiuj sidigis ĉe ĝi. La romanco, inspirita de ŝiaj versoj, plenis la domon, la malgajaj sonoj elflugis eksteren tra la malfermita fenestro. Li ekkantis la vortojn, ŝiajn vortojn de antaŭ kvindek jaroj...

Dum tiuj tri ĝojplenaj tagoj kune kun la juna enamiĝinta viro en ŝian hejmon eniris la vivo mem. Sed tio estis ankaŭ tri tagoj de timo: li povis ekscii la veron. Dank' al Dio, li nenion supozis, li rigardis la fotojn de la „nepino“, parolis pri ŝi, laŭdis ŝiajn talenton kaj belecon. Li demandis la maljunulinon, kial li ne vidas ŝiajn fotojn. Ŝi atendis tiun ĉi demandon, estis preta respondi al ĝi; ŝi diris, ke ŝiaj fotoj estas en la provinco, en la domo de ŝia filo, kie ŝi loĝis dum certa tempo... Filo, bofilino, nepino... La mensogoj estiĝis ĉiam pli multaj. Bone, ke li ne interesiĝis pri la ceteraj familianoj, al li sufiĉas la interparoloj pri lia amata. Kaj Viktoria rakontis al li ĉarmajn okazintaĵojn el la infanaĝo kaj el la nuna vivo de ŝia „nepino“, rakontis al li momentojn el ŝia propra vivo.

Ŝi promeniĝis lin tra la urbo, montris al li belartajn galeriojn, muzeojn, preĝejojn. Ili ambaŭ bedaŭris, ke dum tiu ĉi semajno estis neniu koncerto. Sur Vitoŝa-monto li ravite staris antaŭ la moreno kaj diris, ke rigardante ilin, li kvazaŭ aŭdis la bruon de ilia kreado, vidas, kiel ili naskiĝas el la magmo.

Vespere li sidigadis antaŭ la piano kaj ludis.

La unuan vesperon sonis la belegaj sonatoj de Giovanni Platti. Idiliaj bildoj en baroka stilo vicigis unu post la alia en la malrapidaj partoj. Poste la ritmo estigis pli vigla, kvazaŭ Diana kun sia pafarko postkuris spiregantan kapreolon en banita de suno arbaro.

Viktoria aŭskultis. . . La muziko revenigis ŝin al la jam delonge forpasintaj jaroj. Jen bela nudpie-da knabino kuras tra la herbejoj. En la herbo zumas abeloj, en la kronoj de la proksimaj arboj aŭdi-gas birdaj kantoj. En la malproksi-mo la Balkano apogas per siaj po-tencaj suproj la ĉielon. La knabino kuras tien, al la fonto sub la plej alta supro, por trinki akvon. Sed en ĝia spegulo ĉi-foje ŝi vidas ne infanon, sed junulinon, ekposedi-tan de malklaraj emocioj. . .

La duan vesperon la ĉambron al-flugis „La kukolo“ de Claude Da-quin. La dekstra mano de ŝia ga-sto mezuris egalritmajn 16-onojn kaj la maldekstra eligis el la in-strumento la konatan printempan voĉon — „Ku-ku, Ku-ku!“ Tiktakis ĉiuj horloĝoj en la mondo, kaj el ĉiu el ili sin aŭdigis la kukolo, kvazaŭ disdonanta sortojn.

Viktoria aŭskultis. . . Pri amo kukuis tiam la kukolo, destinis al la junulino plej dezirantan sorton. Si estis deksepjara, kiam vizitis tiun koncerton kaj vidis la orke-strodirektanton. Kaj komprenis, eksentis, ke tio estas Li.

La tria vespero: sonato n-ro 104 de Liszt, laŭ sonetoj de Petrarca. La poeto ne povas trovi trankvilon, ne volas vivi sen sia amata Laura. Poezio el sonoj, trafenitrita de larmoj kaj duboj. . .

Viktoria aŭskultis. . . Tiam ŝi volis vivi por Li, morti por Li. Nek unufoje, eĉ en sonĝo, ŝi ne anstataŭigis lin per iu alia. Si amis lin kiel infanon kaj kiel vi-ron samtempe, amis lin pli ol sin mem. La amo plenigis ŝian animon per lumo, ŝian koron per ekstazo. Si kredis, ke ne havos finon la rava himno, kiun ili kantis kune, ne havos finon la pasio, kiu bruli-gis iliajn korojn. . .

La sonato finiĝis. Si levis sin de sia loko kaj proksimiĝis al la piano. Malfermis la buŝon por di-ri ion, sed ne povis. La juna kom-ponisto rigardis ŝin kaj liaj fin-groj ekglitis sur la klavoj. „Spuroj sur la neĝo“, preludo de Claude Debussy. Unu spiro jam delonge estingiĝis, kiel la lumoj estingi-

ĝas kun la alveno de la nokto. La bildo de la amato estas jam ie mal-proksime, en la rememoroj. La ne-ĝo grincas sub la pezaj paŝoj.

Iam, antaŭ multaj jaroj, Li di-ris al ŝi, ke ne povas, ne forlasos sian edzinon. Ili disiĝis. Post Li ŝi ne ekamis alian viron. Instruis al la infanoj muzikon kaj longan tempon sciis nur la vojon de sia domo ĝis la lernejo. Si ne havis amikojn, nur konatojn. La tempo pasis. Si pensiigis, lernis Esperan-ton, kontaktis kun multaj homoj el la mondo. Ankaŭ kun tiu malju-nulo el Prago, kun kiu ili kores-pondis por pibeligi la vintron de sia vivo. Cio estis malantaŭ ŝi. Cio jam pasis, eĉ la iluzio pri Tiu viro:

— Mi metis la manon sur lian ŝul-ton kaj flustris:

— Mi estas Viktoria.

Li kapjesis:

— Mi scias.

— Si laŭtigis sian voĉon:

— Mi estas la ununura. . . Alia ne estas. . .

La viro milde ridetis:

— Mi scias.

Kaj li denove kliniĝis super la klavojn.

Esperantigis: Lidia RAEVA

Leteroj de korespondamikoj

Karaj legantoj,

Jen nova rubriko „Leteroj de korespondami-koj“, sub kiu ni donos lokon al interesaj kaj enhavoriĉaj leteroj de viaj korespondantoj.

Nature, sendante al ni similajn leterojn por publikigo, vi devas unue liberigi ilin de la detaloj, kiuj koncernas nur vin, lasante tion, kio povus interesi ĉiujn aŭ multajn el la legantoj de nia revuo.

Kaj ne forgesu, ke la rubriko „Leteroj de korespondamikoj“ povas ekzisti nur dank’ al viaj kontribuoj.

Nun ni malfermas tiun ĉi rubrikon per letero de la jugoslava esperantisto Milorad Ĝurĝević al la bulgara E-veterano Nikola Aleksiev — honora prezidanto de MEM.

Milorad Ĝurĝević estas konata al multaj bulgaraj esperantistoj. Li estis unu el la centoj da orfaj jugoslavaj infanoj, kiuj tuj post la fino de la Dua Mondmilito trovis ri-fugejon en nia lando, laŭ interkonsento de ambaŭ registaroj.

Kara kamarado,

Mi esperas, ĉar tion mi deziras, ke vi fartas bone. En la pasinta jaro mi nenien vojaĝis, sed tio ne signifas, ke mi estis malaktiva rilate Esperanton.

De la 1-a ĝis la 21-a de julio mi partoprenis intencan seminarion, kiun organizis Tibor Sekelj. Dum la semi-nario ni havis 9 studobjektojn, kiujn gvidis naŭ apartaj lektoroj. Unu el ili estis d-ro Vilmos Benczik, docento ĉe Budapeŝta Universitato kaj ĉefredaktoro de „Hungara Vivo“. Mi sukcese faris ekzamenon „C“. Tamen por ke mi ricevu post unu jaro diplomon, mi devas plenumi la jenajn taskojn:

— fondi novan esperantistan societon aŭ grave pli-vigligi ekzistantan jam;

— prelegi antaŭ civitanoj pri la Lingvo Internacia;
— gvidi almenaŭ unu esperantan kurson;
— prepari eseon pri la Lingvo Internacia;
— tralegi kvin librojn kun minimume kvincent pa-ĝoj kune kaj fari komenton pri ili.

Pri la unuaj kvar taskoj devas aperi publikaĵoj en iu gazeto.

Ĝis nun mi faris la jenon: en nia fabrika dusemajna gazeto, aperanta en 12 mil ekzempleroj, mi aperigis dum kvar monatoj mian 7-partan eseon pri ideo, problemoj, provoj kaj historio de planlingvoj, inkluzive Esperan-ton kaj ĝian praktikan aplikadon.

De la 1-a de oktobro mi gvidas „A“ kurson de Esperan-to kaj krome, de la 14-a de novembro, ankaŭ „B“ kurson.

Inter miaj „A“-kursanoj troviĝas malsana kamarado, centprocenta invalido. Li ne povas uzi siajn manojn kaj piedojn. Tial mi tajpis lecionon post leciono kaj lia edzino surgluis ĉiun lecionon sur la fridujon starantan apud lia lito. Ankaŭ mi regule vi-zitadis lin kaj ni ambaŭ ekzercis la esperantan konver-sacion pere de lernolibroj de kvar aŭtoroj. Sen iu ajn privilegio, post trimonata studado, li faris la ekza-menon kun bonega sukceso. Nia Esperanto-instituto per-metis al li ne fari skriban ekzamenon, ĉar li nek povas fo-liumi la paĝojn, nek skribi. Kompense li devis pli longe respondi buŝe. En n-ro 11/85 de „El Popola Ĉinio“ ape-riĝis pri li foto kaj teksto.

Poste mi sendis lian adreson al Ĥristo Manolov el Polski Trameŝ kaj al ing. Stefan Georgiev el Ŝumen. Ambaŭ sendis al li kuragigajn leterojn. Eĉ Stefan sendis al li la libron „Mia vivo“ de Trifon Ĥristovski, kiu havis similan sorton. Antaŭ sia malsaniĝo mia amiko estis sportisto, rezerva oficiro kaj maŝinfabrika ingeniero. Nun li agas 47 jarojn.

Jen tiom pri mia esperantista agado.

Dum 1986 mi klopodos veni al Bulgario, ĉar en ĝi mi havas amikojn, fratojn kaj fratinojn, patrinojn. . .

u. Smederevo,
Jugoslavio

Kun respekto:
via jugoslava amiko
Milorad Ĝurĝević



ESPERANTO-TAGO /ESPERANTO-SEMAJNO

Antaŭ tri jaroj la Komisiono pri Publika kaj Eksteraj Rilatoj ĉe Esperanto-Asocio de Britujo (EAB), sub la gvidado de Brian Barker iniciatis Esperanto-Tagon. Oni elektis daton frue en septembro por trafi la atenton de la publiko je la komenco de la studo-jaro, kiam remalfirmigas la vesperlernejoj.

Oni dissendis po du aparte preparitajn afiŝojn al la pli ol 300 lokaj reprezentantoj en Britio kiuj, en kunlaborado kun la multaj lokaj grupoj kaj individuaj esperantistoj faris ekspoziciojn en bankoj, butikoj kaj bibliotekoj. La senpaga perpoŝta kurso estis vaste uzata kaj reklamata. Brian Barker sendis gazetan komunikon al naciaj kaj lokaj ĵurnaloj, radio-stacioj kaj televido.

La rezulto de tia grandega kunlaborado estis, ke la amaskomunikiloj faris el tiu unua Esperanto-Tago, Esperanto-Semajnon pro la daŭra publiko.

Grandan rolon en la laboro havas la Gazetara Servo de EAB, kies membroj tra la lando daŭre traktas la artikolojn, novaĵerojn kaj leterojn, kiuj aperas en la ĵurnaloj kaj magazinoj.

Estas pluraj gravaj punktoj por memori rilate publikon tian: la komunikilo devas atingi la amaskomunikilojn je lundo, kiam la ĵurnalistoj serĉas novaĵojn post la semajnfino. Devas esti bone pretigitaj homoj dise tra la lando por akcepti la petojn intervjui en la radio, televido kaj ĵurnaloj. Tiuj homoj devas havi ĝisdatan, aktualan informon pri Esperantaj aferoj. En grupo-kunvenoj, seminarioj kaj kongresoj okazas prelegoj kaj diskutoj pri la temo „Kiel prezenti Esperanton al la publiko“.

Fine mi emfazas, ke la plej grava afero, kiu certigas la sukceson de Esperanto-Tago/Esperanto-Semajno estas la kunlaborado de ĉiuj tra la lando, kaj tiu sukceso montriĝas ĉe ni en la pliiĝo de informpetoj ĉe la Esperanto-Centro, kiuj kreskis de 50 al 250 ĉiusemajne!

Manjo AUSTIN

El bulteno „Esperanto-Asocio de Britujo“ — Londono, novembro 1985

LPLP: PLI DA ESPERANTO, MALPLI DA DEFICITO

La revuo Lingvaj Problemoj kaj Lingvo-Planado (LPLP) estas eldonata de la Eldonejo de la Universitato de Teksaso sub aŭspicio de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo, la esplora fako de Universala Esperanto-Asocio. Ĝi enhavas fakajn artikolojn pri plej diversaj temoj en diversaj lingvoj, recenzojn kaj novaĵojn. Ĝi aperas trifoje jare sur tricento da paĝoj.

La jaro 1985 estis signifa jaro por LPLP. Transprenis la gvidadon de la redakcio d-ro Humphrey Tonkin, kiu tuj enkondukis diversajn ŝanĝojn. Li akceptis artikolojn ankaŭ en Esperanto; li klopodis pliinternaciigi la revuon.

La unua longa artikolo en Esperanto aperis en n-ro 1/1985, kaj estis bone akceptita. D-ro Tonkin argumentas, ne ke la revuo iel esperantigis, sed ke pli da fakuloj pri lingvistiko nun akceptas Esperanton kaj eventuale mem uzas ĝin. Do, la revuo tenas sian fa-

kan objektivecon, sed donas pli da atento al Esperanto. Dua, pli mallonga, artikolo en Esperanto aperis en n-ro 2/1985, kaj aliaj sekvis.

Estontaj numeroj de la revuo enhavos artikolojn pri lingvoekonomiko, instruado de Esperanto en elementaj lernejoj kaj aliaj temoj. Oni antaŭvidas, ke ĉiu numero de la revuo enhavos kontribuojn el minimume seso da landoj kaj en almenaŭ kvar lingvoj. Ĉiun artikolon akompanos longa resumo en Esperanto.

LPLP estas prestiĝa kaj konata revuo en la fako lingvistiko kaj soci-lingvistiko kaj konvinka pruvo pri la efikeco de Esperanto kiel faka lingvo. Ĝi ankaŭ donas interesan superrigardon pri temoj najbaraj al la Esperanto-movado. La revuo estas abonebla pere de UEA — jarabono kostas 18 usonajn dolarojn.

IGS de UEA, novembro 1985

ALVOKO AL ESPERANTISTAJ PRESISTOJ

Jam multaj presistoj laboras por la disvastigo de Esperanto. Ni opinias, ke jam estas tempo kunigi la samfakulojn de tiu tereno. Ni intencas unue konigi al la esperantistaj presistoj nomaron (adresaron) de tiuj presistoj, kiuj sentas la bezonon de kunlaboro.

Mi petas tiujn presistojn, kiuj intencas en la estontaj kunlabori, konigi sian precizan adreson.

Se vi havas opinion pri planita kunlaboro, bonvolu skribu tion al adreso:

Vilmos BACSA
5701 GYULA
PK. 96
Hungario

POTSDAMA SOMERA ESPERANTISTA TENDARO

Denove ni aranĝos renkontiĝon de esperantistoj en nia bela distrikta urbo Potsdam proksime de la ĉefurbo Berlino de la 23-a ĝis la 30-a de aŭgusto 1986. Tranoktado en junulara gastejo „Pirschheide“ (en tre modestaj kabanoj aŭ propraj tendoj). Oni ne povas kuiru mem, sed estas ebleco por matenmanĝo kaj vespermanĝo en la junulargastejo.

Car la aranĝo estos internacia esperantista tendaro, la partoprenantoj devus esti kapablaj konversacii esperantlingve!

La prezo inkluzive maten- kaj vespermanĝo por 7 tagoj estas: por eksterlandanoj — 60 markoj kaj por GDR-anoj 40 markoj.

Limdato de aliĝo: 31. 05. 86.

Pluajn informojn kaj aliĝilojn oni ricevos ĉe:

S-ino Brigitte Raabe
GDR 1546 STAAKEN
Sulzbacher Steig 1

SLOVAKIA NATURO ATENDAS VIN

12-a Turisma Semajno (TUSE) okazos en Slovakio paradizo proksime de Spišská Nová Ves inter la 19-a kaj 25-a de julio 1986.

Loĝado en 2-4-litaj ĉambroj en turismaj domoj, manĝado en kampadejo. En la programo estas perpie-daj ekskursoj, 2 tutaĝaj perbusaj ekskursoj al Levoča, Glacia groto de Dobšiná, Altaj Tatroj. Vesperaj E-programoj, amuzvesperoj, konkursoj.

Kotizo: 810 kaj 930 Kcs, laŭ kategorio.

Specialaj premioj por partoprenantoj, kiuj parolos nur Esperante! Pliajn informojn donas kaj aliĝilojn akceptas: Peter Pavuk, Jilemnického 17, ĈS — 052 01 Spišská Nová Ves.

Tuj post TUSE komenciĝas la 26-an de julio en Žilina „Turismaj Tagoj — TUTA“, pri kiuj informojn donas: Ing. J. Gondzúr, Levocská 3, ĈS — 010 08 Žilina.

Profitu eblecon pasigi du-semajnan libertempon en belega slovakia naturo en Esperanta medio.

KONTAKTOJ SERĈATAJ

Karaj samideanoj,
Eble en Bulgara Esperantista Asocio membras ankaŭ handikapuloj. Versajne ne estas organizitaj en memstara organizo (krom la nevidantaj esperantistoj). Membroj de la Sekcio de Esperantistoj-Handikapuloj ĉe Ĉeĥa Esperanto-Asocio deziras starigi kontaktojn kun bulgaraj esperantistoj-handikapuloj. Tiu deziro koncernas kian ajn invalidecon, sed ĉefe temas pri samideanoj malbone moviĝantaj. Adreso: **Josef Vaneček**, Na Libuši, 630, 391 65 **BECHYNE**, Ĉeĥoslovakio

FRUKTODONAJ FERIOJ

Kaŝista en la sino de la Balkanmontaro, urbo Etropole, dum la feriaj tagoj estiĝis alloga centro por la lernantoj-esperantistoj el la distrikto de Sofio. La Distrikta Estraro de BEA organizis vintrajn feriojn por 100 junaj esperantistoj. Kunlabore kun la Distrikta Konsilantaro pri Popola Klerigo estis formitaj tri grupoj — du lernejanaj kaj E-kurso por instruistoj. La mezlernejoj-esperantistoj el urboj Ihtiman, Kostinbrod, Slivnica, Godeĉ kaj Botevgrad estis enloĝigitaj en la montodomon „Staroplaninec“, proksime de Etropole.

Pri la fruktodonaj ferioj de tiuj junuloj la sekretario de DE de BEA Radoslav Paraŝkevoj informas:

— Mi opinias, ke ni trovis interesan formon por vintra feriado. Dum la ripozo la lernantoj konatiĝis kun iuj aktualaj problemoj de la E-movado ĉe ni kaj eksterlande. La junuloj-esperantistoj travivis ĝojajn tagojn, ĉar trovis novajn amikojn-samaĝulojn el aliaj distriktaj loĝlokoj. Paralele kun la kelkhora lingva lernado la lernejoj ĉiutage partoprenis diversajn amuzigojn. La liberajn horojn la junaj esperantistoj pasigis en la naturo. Ili ekskursis al la historia monaĥejo Etropole.

La junpioniroj kaj iliaj instruistoj-esperantistoj lernis Esperanton kaj feris en la urbo mem. La junpioniroj, partoprenantoj en la folkloro ensemblo ĉe Unueca Meza Politeknika Lernejo „Vasil Levski“ en Botevgrad, havis ankaŭ siajn unuajn lecionojn de Esperanto.

Atanas ILKOV

El nia leterkesto

Estimata Redakcio,

Antaŭ nelonge ni ricevis ekzemplerojn de la revuo „Bulgara Esperantisto“. Multan dankon!

Ni disdonis la kalendarojn al niaj grupanoj kaj poste ni aranĝis programon, dediĉitan al „BE“. La grupanoj rakontis pri siaj impresoj, sciigis pri la enhavo de interesaj artikoloj.

Ni gratulas vin pro la altnivela revuo de bulgaraj esperantistoj. Restu ĉiam fidelaj kaj entuziasmaj adeptoj de Esperanto kaj de la paco.

Kun koraj salutoj!

Anoj de E-grupo „Ujlaki“. Budapeŝto

Mi skribas al vi bulgarlingve, ĉar mi estas tute nova esperantisto. Jam en la unua leciono nia kursgvidanto disdonis al ni kalendarojn de via revuo „Bulgara Esperantisto“, kiuj multe plaĉis al mi. Pro tio mi deziras aboni ĝin kaj per Esperanto trovi novajn amikojn inter bulgaroj. Mi respondos al ĉiuj, kiuj skribos al mi en Esperanto, hispana kaj bulgara lingvoj.

Mia nomo estas Gustavo Morales, kaj mi estas 29-jaraĝa. Jen mia adreso:

Dardel № 209

c/r Cubos y Barrutia

Rpto: D' Beche — 6 bcoa II

C. Habana, CUBA

ENHAVO

*** Programo por totala malarmado	II
*** XIII kongreso de BKP kaj scienc-teknika progreso	I
G. MAERTENS. Elokventa konfirmo de nia strategia	2
V. ANTONOVA. Impeta virina agado	3
A. DJAKOV. Ekspozicio de originalaj kreantoj	4
G. MIHALKOV. „Hungara Vivo“ — 25-jara	5
P. MILANOVA. Sur Esperanta posteno	6
B. PRODANOVA. La Aprilov-gimnazio — verda torĉo	7
HO MO GO. En la lando de lotusfloroj	8
*** Novaj libroj	9
M. JANKOVA. Komputilo en BEA	10
*** Zamenhofaj festotagoj	12
N. ANDRIANOVA. Mi gloras la amikecon	12
*** Juna esperantisto	13
N. STATKOV. Spuroj sur la neĝo	14
*** Enlanda movado	16
*** Deziras korespondi	III
I. TUPA. „Barbuloj“	IV

Sur la unua kovrilpaĝo:

Virinoj por paco

Grafikaĵo de Dimităr Donev



BULGARIO

Vesela Jankova (42-jara) — pri vojaĝoj, filozofio, kolektas librojn pri pentro- kaj skulptarto; kaj ŝia filino: Mariana Stojčeva (21-jara) — pri kino, muziko, kol. BK; povas respondi ankaŭ angle kaj itale — Ĥaskovo 6300, str. „Kozloduj“ 8.

HUNGARIO

Gelernantoj (9—11-jaraj) kaj ilia instruistino — Horvath Eva, Deak u. 140 Kovacsne, Söjtör, H-8897 — interesiĝas pri historio kaj pri la nuntempa vivo en Bulgario.

POLLANDO

Gelernantoj (16—17-jaraj) kaj ilia instruisto — Wiesław Stanicki, Liceum Ogólnokształcące, 07-120 Łochow — pri muziko, filmoj, sporto, turismo, historio, filatelo; kol. BOK.

SOVET-UNIO

Smoginyte Daiva (21-jara studentino) — Litovio SU-234270, Vilkaviškis Donelaičio 14 — pri literaturo, muziko, turismo.

Vladimir Efremov (18-jara studento) — Leningrado SU-196210, kv. 10, ul. Pilotov 24 — dez. kor. pri ĉi tiu kun ĉi.

Danute Daciulyte (17-jara) — Lietuva SU-234880, Lauko 66 Kupiškis — pri muziko, lingvoj; interŝ. BK, PM.

Familio Genute kaj Aivaras Liepiniai (24-jaraj) — SU-229220, Latva SSR, Madona — l. p. k. 25 — dez. amikan korespondadon kun bulgara familio.

Sergej Veršinin (23-jara) — SU-432021 Uljanovsk, Radischeva 34a—4 — dez. kor. kun ĉi tiu Jogo kaj aliaj temoj.

Ljudmila Civiljova (24-jara) — SU-614008, Perm, str. Bolŝeviŝkaja d. 167, ap. 27 — dez. kor. pri teatro, opero.

Elena Avidik (29-jara pedagogo) — SU-230025, Grodno-25, dom Svjazi, poŝtrestante — dez. kor. kun ĉi tiu pri kino, arto, turismo, fremdaj lingvoj kaj ĉiutaga vivo.

La Barbuloj

Jam preskaŭ 100 jarojn la popolojn el la tuta mondo proksimigas kaj amikigas la internacia lingvo Esperanto. En siaj kongresoj, konferencoj, simpozioj esperantistoj ne nur esprimas sian opinion pri diversaj problemoj, sed ankaŭ prezentas la kulturen vivon de siaj landoj — esperantistoj estas multaj verkistoj, poetoj, pentristoj, kantistoj. Sed la country-grupo „Barbuloj“ nun estas unika en la mondo. Tio estas amatora grupo el Prago, kiu plenumas en Esperanto la pliparton de la kantoj en sia repertuaro.

Pri tio kiel fakte ili komencis okupiĝi pri Esperanto kaj pri muziko, ni demandis la gvidanton de la grupo Peter Nidl.

„Proksimume antaŭ kvin jaroj, kiam mi organizis nian muzikensemblon, mia patrino, tiutempe kunlaborantino en la sekretario de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, invitis min partopreni la kongreson de tiu asocio. Tie mi ĉeestis sinprezenton de pola dancgrupo kaj al mi venis la ideo, simile al ili, organizi grupon, sed „country“. Tiel naskiĝis la country-grupo „Barbuloj“.

„Kia estas la konsisto de via grupo kaj kiel vi solvadis la problemon pri teksto de la kantoj?“

„En la grupo partoprenas Eduardo Knopek — kontrabaso, Martin Černij — banĝo, Zdenek Smolik — mandolino, Ladislav Vojta — violono, Peter Nidl — gitaro. Membro de nia grupo fakte estas ankaŭ mia patrino, Nadejda Nídl-ova — kiel aŭtoro de la teksto de nia programo kaj kiel programkondukisto. Samtempe ŝi organizas la koncertojn de la grupo kaj plenumas la rolon de impresario.

Mi kunlaboras kun la bonega tradukisto Karel Franc, kiu esperantigis por ni la tekstojn de iuj konataj country-kantoj. Lastatempe ni provas mem verki tekstojn. Kompreneble, ni ĉiuj devas ellerni Esperanton. La kreo de nia grupo trovis gravan apogon ĉe la esperantistoj, ĉar ĝi estas esprimo de ilia ĉefideo pri reciproka interkompreniĝo de la popoloj en la mondo. Kaj la kanto estas bonega instrumento



por realigo de tiu ideo. Ni aperas ne nur en kongresoj kaj renkontiĝoj de esperantistoj, sed same antaŭ neesperantista publiko. En tiaj koncertoj ni plenumas ankaŭ kantojn en Esperanto kaj la publiko ĉiam tre bone akceptas ilin.

La grupo „Barbuloj“ jam estas konata ankaŭ en eksterlando, ekzemple en Hungario, GDR, Pollando, kie ili aperis en programoj de la radio kaj televido. . .

„Ni ŝatus turnei tra Sovetunio, kie en preskaŭ ĉiu granda urbo ekzistas organizaĵo de esperantistoj. Esperanton oni eĉ instruas kiel nedevigan lernobjekton en la altlernejoj. Ni ŝatus koncerti ankaŭ en Bulgario kaj Jugoslavio, kie same estas multnombraj kaj aktivaj esperantistaj organizaĵoj. En alilando ni kantas ne nur pri Ĉeĥoslovakio, pri ĝia bela naturo kaj pri la vivmaniero — konsiderindan parton de nia repertuaro prezentas kantoj pri la paco, pri la trankvila paca vivo. Ja ni ĉiuj volas vivi en paco, ĉar sen ĝi ne estas eblaj la vivo, la krea laboro. . .“

La nuna mondo devas solvi multajn variajn problemojn. En la sama tempo, kiam de unu flanko de la dividlinio ĉiam pli forte sonas voĉoj por paco, de la alia flanko oni inventas, konstruas kaj eksperimentas novajn, ankoraŭ pli terurajn armilojn por neniigo de homoj. Al la alvoko de la pacamaj fortoj per sia arto kontribuas ankaŭ la grupo „Barbuloj“, unuigante la kanton kun la lingvo Esperanto, helpe de kiu povas interkompreniĝi la homoj en la tuta mondo.

Itka TUPA, Agentejo „Orbis“, Prago
Foto: Zbinek Kail

Ĉefredaktoro: Donĉo ĤITROV

Vicĉefredaktoro: Ĥaim LEVI

Respondeca sekretario: Lidia RAEVA

Redakta komitato: Marin BACEV, Mariana ELENOVA, Dimităr HAĜIEV, Krăstju KARUCIN, Georgi MIĤALKOV, Venelin MITEV, prof. d-ro Kiril POPOV.

Teknika redaktoro: Ljubomir LAZAROV

Administranto: Asen JOSIFOV

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919, distingita per ordeno „Kiril i Metodij“ — I grado. Eldonkvanto — 6500 ekz.

Adreso de la redakcio:
„BULGARA ESPERANTISTO“
Bul. Ĥristo Botev 97

1303—Sofio, Bulgario 1 000 Sofio P. K. 66
Ŝtata presejo „Georgi Dimitrov“, bul.Lenin 117